ISSN 0984 7626

# evangeliaj kajeroj

## LA REGNO DE DIO



5
1989

EVANGELIAJ KAJEROJ

*internacia kristana revuo en Esperanto*


---------------

*Listo de la planataj sekvantaj numeroj*

6 UNUECO, por ke ili ĉiuj estu unu

7 PACO, feliĉaj estas la pacigantoj

8 JUSTECO

---------------

Ni daŭre serĉas kunlaborontojn. Se vi deziras kunlabori, vi povas peti instrukciojn. La *artikoloj* estas petataj, sed vi povas libere sendi mallongajn *kontribuaĵojn, recenzojn, noticojn,* kiuj iel rilatus al la temo. Vi ankaŭ povas fari intervjuojn, poste tradukitajn.

La aŭtoroj respondecas pri la enhavo de la propra artikolo.

---------------


Redakcio, administracio : Philippe Cousson, Rue de Pré-Ventenet, 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio ;
tel : 49 46 80 21, el eksterlande 33 + 49 46 80 21.


- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -


*Directeur de la publication : M. Philippe Cousson.*
*Dépôt légal : juin 1989.*
*Editeur : Philippe Cousson, Nouaillé-Maupertuis.*
*Imprimé par : Michel Brun SARL, Poitiers (12 rue des Frères Lumière, Beaulieu, BP 252, 86006 PoitiersCedex).*


Ĉu estas temo, kies prononco tuj elvokas tre malsamajn ideojn, tia estas la Regno de Dio, kaj tio tuj videblas en la enhav-tabelo.

Kvankam ĉi-foje (parte pro atendaditaj ne alvenintaj artikoloj) la diverseco de la aŭtoroj ne estas tiel vasta kiel esperita, oni ankoraŭ povos trovi multon por pripensi.

Certe kelkaj pensos : ĉu vere li povis enmeti ĉi tion ! Jes, mi aŭdacis, foje post hezito tamen, ĉar mi supozas, ke vi estas sufiĉe maturaj por, kiel la Bereaanoj, eltiri por via vivo ion utilan.

Mi eĉ diras pli. Ĉu vi havas ion interesan por diri pri la baldaŭaj temoj. Sendu mallongan kontribuaĵon (ĝis 2 aŭ 3 paĝoj) al la redakcio, aŭ recenzu libron, ktp. Aŭ eĉ, proponu temeron por pli longa artikolo.

P. C.

*EN LA SESA NUMERO*

oooooooooooo

*Duvoĉe pri la Dombes-grupo (Alain Martin kaj René Girault)*

*Kunlaboro pere de la Biblio (David Featherstone)*

*Por ke la mondo kredu ! (Jelly Koopmans)*

*Interkonfesia dialogo : amo kaj vero (Cyril Hórak)*

*La Dua Vatikana Koncilio kaj ekumenismo (Battista Cadei)*

*Historio de la Ekumena Konsilantaro de Eklezioj (Philippe Cousson)*





# REGNO DE DIO, REVO DE DIO

En Nombroj ni legas (laŭ la traduko, kiun mi liveris por la farata Ekumena Biblio) en 24:15-17 jene :

"Li ekparolis sian kantaĵon :
Orakolo de Bileam, filo de Beor,
orakolo de l'viro [...]*,
orakolo de kiu aŭdas la vortojn de Dio,
kiu scias, kion scias la Plejalta,
kiu vidas la viziojn de l' Ĉiopova,
kuŝante kun okuloj senvualaj :

Mi vidas lin, sed ne en la nuno,
mi rimarkas lin, sed ne de proksime :
Stelo leviĝos el Jakob,
sceptro altiĝos el Izrael :
li frakasos la tempiojn de Moab,
la kranion de ĉiuj filoj de Set*."

* * * * *

Estas belega rakonto, tiu pri Balak kaj Bileam. Multaj malnovaj popoloj posedas streĉajn kampadajn rakontojn, kiuj traktas pri riskaj momentoj de ilia ekzisto. Se foje vi kampadis, vi ja konas la etoson : vespere oni sidas ĉirkaŭ fajro, svaga lumo, moviĝema, en la raboj malantaŭ onia dorso jen fantomaĵoj, strangaj sonoj de noktbirdoj, susurado inter branĉetoj, knarado - la etoso ja senteblas. Kaj tiam iu ekrakontas... Eble en tia etoso oni legu la rakontojn de tiu ĉi ciklo. Izrael vagas tradezerte, fuĝe el la MICARIM (la premateco, la subpremo) [Egipto en la hebrea estas MICRAIM - bela trafa vortludo]. Ne unuavice temas ja pri tiu geografia indiko : unuavice temas pri forfuĝo, eskapo el situacio ne homdigna. Kaj ili vagas tradezerte, serĉe je promesita tero, serĉe je eblo, vivi laŭ hominda, di-dezirata maniero. Kaj survoje vojmontrilojn ili ricevas : la t.n. Dek Vortojn. Ĉiujn en estonta formo : kiam vi vivos en la lando de hominda vivado, vi estos justa, vi ne mortigos, nek ŝtelos, nek trompos, ktp. -os, -os, -os...

Nu, la noktfajreja rakonto pri Bileam : Ho ĉu vi scias : foje ni vagis, nenion posedante, neniom valorante laŭ taksado homara, ni eskapis el MICARIM, serĉis je ŜALOM - kaj survoje renkontis nin regno potenca : Moab. Moab ne bonvolis nin lasi pasi ; Moab nin timis : ĉar estas timo, malpermesi la pasadon. Moab nin timis, ĉar ni montris vivmanieron, vivceladon kiu plene kontraŭis al tio, kio kutimas en nia mondo. Ĝi timis nian nesamecon, nian fremdecon. Por

ĝi ni estis danĝeraj : ni ne akordiĝis en ilia mondpercepto.

Kaj ĉu vi scias, kion faris ilia reĝo Balak ? (Ĉar Moab, estante regno ja havis reĝon, kompreneble ; Izrael, kiel areto da fuĝuloj ne estis organizita) Balak alvokis la plej potencan, la plej timigan sorĉiston, diveniston kaj ŝamanon de la tuta mondo : Balak alvokis Bileamon !

La paroloj de tia ŝamano ja estas potencaj. Memoru pri la kantistoj en Kalevala ! Bileam, laŭ peto de Balak, do devis malbeni Izraelon ! Tiam ĝi aŭtomate ja neniiĝos...

Sed Bileam ĝin benis ! Imagu la konfuzon ĉe Moab. Dua-, tria- kaj eĉ kvarafoje Bileam ĝin benis ! Bileam, la viro, kiu "scias kion scias Dio", "kiu vidas kun okuloj fermitaj"...

Jen la noktfajreja rakonto : kaj ĝia mesaĝo ? Ĝi mesaĝis : ne perdu la kuraĝon ! Kuraĝe antaŭen, ni ja estas sur la ĝusta vojo : eĉ profetoj paganaj nin benas !

Iom pli sobre, demandante sin, kion fakte profetis Bileam, oni konstatos baldaŭ, ke tio ne tre klaras. "Venos iu", sed kiu ? "kiel stelo li leviĝos", ĉu ni kristanoj tuj hastu diri : ho jen la Stelo de Betleĥem ? Aŭ ĉu, pli sindetene, ni konstatu, ke en la origina teksto ne estas tre klare ? "Kiel sceptro", kio ? sceptro ja estas simbolo de potenco ! Potenco por Izrael ? Por tiu manpleno da fuĝuloj ? Por tiuj eskapintoj el MICARIM ? "Frakasos la tempiojn de Moab", ho ! he ! ĉu tio ne estas la kuraĝaj vortoj - forfore diritaj - de knabeto, kiun pli granda knabo ĵus ege frapadis ? Mi ja venĝos min ! Pliposte, kiam mi estos fortika ! vortoj de senpotenculo venĝema...

Kaj tamen : kiel ajn svagaj, kiel ajn neklaraj : tiuj profetaĵoj de Bileam, kiom ajn plibeligitaj en epoko pli posta (ĉar eĉ tio ja eblas), ili tamen tre klare funkciis dum la tempo, funkciis kiel kuraĝigo, eĉ meze de timiga plimulto malamika : ne perdu kuraĝon, antaŭen, ek ! Ni ja estas ĝustavoje ! Plu, en la nomo de JHVH, serĉe je la promesita tero...

Ĉar tiun ni homoj ĉiam ankoraŭ sopiras.

Ĉu estas revo, pensi ke manpleno da homoj, vaguloj sen posedo, sen potenco, sen reĝo, sen io ajn, ĉu estas revo, pensi ke ĝuste ili atingos la promesitan teron ?

La Biblio eĉ asertas, ke ili igos atingebla la promesitan teron por la tuta homaro : "En vi estos benataj ĉiuj popoloj" (Gen 12:3). Ne unuavice temas pri la areto da vaguloj, sed temas pri ilia





tasko : la tuta mondo bezonegas teron homindan, homviveblan.

Alia citaĵo : en Luko ni legas (1:46-55) la Kantikon de Maria : ni konas la rakonton ; ĉiujare tre kortuŝas ĝi, okaze de Kristnasko, ĉar tio ja estas festo tiel intima, tiel plensenta. Sed se unu momenton oni vere trasentas ĝin, serioze kaj plene ĝis konsekvencoj ĉiutempaj... ho kia historio ! Infaneto ankoraŭ, tiu etulino juna, fianĉino jam, graveda, kaj la fianĉo scias pri nenio ! Imagu la honton de l' familio ! Kion povos fari el sia vivo tia knabineto ?

Kaj tiu Maria ekkantas, kaj kian kantikon ! La protestkantoj de la pop-muziko de la jaroj 60 paliĝas, kompare ĝin. Nenio humila, nenio peteganta : ho ne ! Ŝi defias la mondon. Dio kompatis pri mi : jen kiel ŝi vortigas sian gravedecon ! Kio okazis al mi, diras Maria, estas dia kompato. La homoj ne komprenas, nul ĝin komprenas, eble eĉ misfamigas ŝin, nu ili faru laŭdezire : por ŝi ja estas dia savo, kompato, helpo ! Ke ŝi naskos tiun bebon, kiun ŝi nomos Jesuo ( = Dio savas).

Socie ŝi tiuloke, tiakondiĉe kompreneble ne gravis ; sed ŝi kantas, ke Dio grandegulojn humiligas : tiuj ne plu gravas ! Dio kompatas malsatantojn, senhelpajn, povrajn, kaj li superŝutas ilin per la plej bona.

La plej bona ? Kio estas ? Nu, ŝajne ne : riĉo, ĉar tiun Dio ne donas. Kio do alia ? Ne ni tion povas diri por ili : tion povas konfesi pri sia vivo maksimume la malriĉuloj, la povruloj mem. Sed por Maria certas : Dio kompatas ilin, kaj Dio ne flankas ĉe la potenculoj.

Revo ? Nekontesteble jes. Certe, se rigardi la eksteran historion de la judoj. "Dio kompatas, Dio helpas sian sklavon Izrael", nu, la romianoj masakris multajn kaj bruligis la templon. "Dio flankas ĉe Izrael", revo ĉu ?

Jes.

Kaj tamen :
Se la vivo de Jesuo decidige montris ion ajn, do minimume tion ĉi, ke la vojo de ĉi tiu mondo, la vojo de potenco kaj perforto neniam identas je la vojo de Dio. Jesuo ne venis por estri, por regi, sed por servi, por sklavi. Dio ne flankas je la potencstrukturoj. Dio elektas ĉiam por homoj : temas pri la homidoj. Kaj tio estas plej plene neakordigebla kun la strebadoj de politikistoj, potenculoj, diktatoroj, ktp. : jes vere : Dio flankas ĉe Izrael, ĉe tiu manpleno da vaguloj, serĉe al la promesita lando, strebe al mondo hominda.

Jesuo prediktis la "Regnon de Dio" : ĝi venis, li diras. Dum tiom da jarcentoj ni kristanoj ripetadis, ke ĝi venos : jen la diferenco.

Jesuo vivis plene el tiu certeco, kiun ni sobruloj ofte nomas "revo".

Oni permesu, ke mi finu per cito el poemo mia (aperinta en *Poemoj por paco*) :

La Teron ni heredis de la
  generacioj nin antaŭaj
    por lasi ĝin al la morgaŭaj
      juvela...

Do revas ni okulaperte :
  Venu ŜALOM' en plena senco,
    konstruu ni kun pacienco
      kaj lerte

ĉi mondon, sed inversigita !
  Ĉesu malgaj' de kiu ploras :
    larmfrapojn onte ni titolas
      granitaj !

Por senhejmuloj jen tegmenton,
  putojn konstrui en dezerto,
    laciĝi eĉ ne pro fi-sperto
      momenton :

ekhaltu fine fuĝantfluo,
  ĉies ĉagrenon ni forkisos,
    nenies larmojn plu publicos
      revuo.

Ho glora celo : Sankta Paco !
  Home vivadi sur ĉi Tero :
    estu Justeco kaj Libero
      kompaso !

La Regno de Dio, jen la Revo de Dio : revo pri tiu ĉi mondo, sed tute malsimila al nun aŭ iam ajn ĝis nun. Revo pri mondo vere viv-ebla, hominda, diinda.

Gerrit Berveling, Nederlando

**Gerrit BERVELING (1944), nederlandano, fakulo pri klasika filologio latina kaj helena, teologo, pastoro en la Remonstranta Eklezio, esperantisto de 1972, poeto, eldonanto de *Voĉoj Kristanaj*.**





# KIU REGNO DE DIO ?

## Aktualaĵoj.

Kia teologia demando ! Sed tamen, ĉu tiu ĉi demando ne taŭgas por la nuna mondo ? Ni simple rigardu la aktualaĵojn.

Usona reĝisoro verkis filmon. Brita aŭtoro verkis libron. Kaj kontraŭ ili tuj furoris... religianoj. Kvankam la reago ne estis sama, sed tamen bruligi kinejon, ĉu vere malpli grava ol alvoki por murdo, la gvidanta principo restas sama. Tiuj religianoj, kiuj manifestaciis kaj pli, tute malfavoris socion laikan, t.e. socion ne regatan de iu specifa religio, kaj malfermata al ĉiuj.

Sed eĉ, sen rigardi nur la aktualaĵojn, delonge religianoj volas regi ekzemple la seksan vivon de la samtempuloj, ĉu kredantaj aŭ ne. La problemoj pri seksa etiko estas problemoj pri religia etiko.

Kiam estas sur la sama terpeco anoj de diversaj religioj, ĝenerale, paco ne povas ekzisti, aŭ almenaŭ ne povas daŭri, ĉar ĉiam unu grupo vola devigi la alian sekvi siajn viv-regulojn. Mi nur lsitigis kelkajn nunajn konfliktojn, ne ĉiuj militajn : Armenio / Azerbajĝano, Kartvelio / Abĥazio, Norda Irlando, siĥoj / hinduoj, Libano. Kompreneble, en multaj kazoj, la aferoj ne estas tiel simplaj, kiel ŝajnus, kaj ĝenerale aldoniĝas problemoj pli "pure" politikaj, ekonomiaj, klientelismo[1], ktp.

## Religio kaj kulturo.

En nia nuna epoko, en la okcidenta civilizo, oni havas problemon kompreni, ke religio estas integra parto de tuta kultura-politika-religia-ktp-a sistemo. Tiu ĉi sociologia certeco ne priskribas novan fakton, sed ĉiaman fakton. En ĉiu homa civilizo, escepte de la okcidenta, religio ne estas disigebla de la cetero. Kaj kompreneble tio kaŭzas konfliktojn inter la diversaj civilizoj (do cetere religioj), kaj nun ankaŭ kun la laika okcidenta preter-religia civilizo.

Mi citos nur kelkajn. La islama socio, kvankam en ĝi estas multaj sektoj, kaj malgraŭ la ĉefa disiĝo inter ŝijaismo kaj sunaismo, aperas, restas, kiel unu familio, de Maroko ĝis Indonezio. Antaŭnelonge en kelkaj landoj aperis nova religio, kiu volis neniigi la religion, t.e. ateismo. Same kiel la aliaj ĝi volis regi la tutan socion, malpermesante la aliajn religiojn. Alia kazo, ne tre facile analizebla estas la Rom-katolikismo. Historie, kiam

estis la kristana socio en la Meza Epoko, la Eklezio regis ĉion. Sed la tempoj multe ŝanĝiĝis. Kaj nune, laŭ la homoj, laŭ la landoj, laŭ la situacioj, oni ankoraŭ aŭ ne povas senti la rektan influon super la socia evoluo.

### Integrismo.

Kaj aperis nova vorto, kiam la socio komencis disiĝi de la religio, nome integrismo. Kiu do estas la integristo ? Li estas ano de iu religio, kiu ne akceptas ŝanĝon en la religia sistemo, kiu ne akceptas ŝanĝon en la socia sistemo, kiu rifuzas la apartigon unu de la alia.

Ene de modernaj socioj aperis la dividiĝo inter la praktikantoj kaj la ne-praktikantoj de religio. Samtempe la socio distanciĝis de la religiaj normoj, iom post iom, komence en la okcidenta mondo, kaj nun preskaŭ ĉie.

Kaj sekve alvenis nova vorto, nova ideo, libereco. T.e. libereco sekvi aŭ ne la religion, ambaŭsence, libereco obei la religiajn normojn, regulojn, libereco pri la "ne-religia" vivo.

La muzulmanoj uzas la terminojn "islama lando", "islama respubliko". Grupoj volas uzigi la islaman leĝon, la "ŝaria"-on. Kio kompreneble estas ne akceptebla de okcidenta menso, ke religio al kiu li estas tute fremda regu la tutan vivon.

En Hindio, la siñoj volas sendependan Penĝabon, t.e. siñan ŝtaton.

Kiam okazis en Francio la religiaj militoj, tute ne temis pri volo malaperigi la aliulojn, sed pri defendo de la sistemo vivata, de la propra kulturo, de la propra libereco, de la valoroj, kiujn la aliaj ne agnsokis kaj danĝerigis.

Laŭlonge de la historio, kompreneble, la kristana fido alprenis ĉirkaŭ si tutan socian, kulturan sistemon. Sed, vere, la kristana fido estas unue individua. Ĝi estas intima rilato inter la homo kaj lia Dio. Kaj tiu fido povas fariĝi videbla en tre malsamaj kulturaj kuntekstoj. Oni tiam parolas pri kuntekstigo de la fido, de la Evangelio. Nur antaŭnelonge, oni komprenis, ke ne nur la okcidenta maniero vivi kristane estas la bona, se ke aliaj povas same esti pravaj.

### Surtera Dia Regno ?

Kaj malgraŭ tio pri la kristana fido, estas multaj kristanoj, kiuj volas, ke la tuta socio fariĝu kristana, aŭ almenaŭ kristaneca. Ili volas konstrui, aŭ alvenigi la Dian Regnon suteren. Ĉu





estas tio farenda ? Ĉu estas establenda teokratio ? Sen iri tro for, multaj kristanoj strebas por ŝanĝo de la socio, ĉu ne ?

Sed estas kelkaj kristanoj, ĉefe en Usono, la t.n. *reconstructionists* (rekonstruistoj)[2], kiuj volas validigi la diversajn leĝojn de la Malnova Testamento. Interalie, ili proponas mortopunon por la blasfemantoj. Oni ie iam aŭdis ĉi tion.

En alia direkto, oni tamen povas konstati la efektojn de la kristanaj streboj ŝanĝi la socion (kiun cetere ili antaŭe kontribuis kosntrui). Mi citos en neĝusta ordo : la statuso de la virino, la forigo de sklaveco, moderna demokratio, helpo al disvolviĝo.

Sed, kial ĉi tiuj streboj ? Oni povas retrovi ilin en diversaj bibliaj tekstoj, kiuj priskribas la regnon de Dio, kiuj indikas modelon por sekvi, ekzemple en Jesaja 58 :

> "Ja nur tio estas fasto, kiu plaĉas al mi, se vi disŝiros la ligilojn de malpieco, disbatos la katenojn de sklaveco, liberigos la prematojn, disbatos ĉiun jugon ; se vi derompos vian panon por malsatulo kaj senhejmajn msatulojn enkondukos en vian domon ; se, vidante nudulon, vi lin vestos, kaj antaŭ viaj samkarnuloj vi vin ne kaŝos"(v. 6-7).

Ankaŭ en Romanoj 14:17 videblas indiko pri kio temas la regno de Dio :

> "Ĉar la regno de Dio estas ne manĝado kaj trinkado, sed justeco kaj paco kaj ĝojo en la Sankta Spirito."

Kiu, kia, do estas la regno de Dio ?

Por iomete kompreni, kia estas tiu regno de Dio, kiu estas oftege menciita en nia Biblio, tiel ke pluraj bildoj aperas, kaj ankaŭ pluraj interpretoj videbliĝis.

Mi provis ordigi la diversajn bibliajn tekstojn. Kiam oni unue listigas ilin simple laŭ konkordanco, oni havas la impreson de granda malordo, ega diverseco.

### La regado de Dio.

Mi komence uzos tri versiklojn el la Psalmaro.

> "Ĉar al la Eternulo apartenas la reĝado." (22:28)
>
> "Lia reĝeco regas ĉion." (103:19)
>
> "Ili raportos pri la gloro de Via regno, kaj parolos pri Via potenco, por sciigi al la homidoj Lian potencon kaj la majestan gloron de Lia regno. Via reĝeco estas reĝeco eterna, kaj Via regado estas por ĉiuj generacioj." (145:11-13)

Johano metas en la buŝon de Jesuo : "Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo" (18:36), kaj la aŭtoro de la epistolo al la Hebreoj diras, ke la regno estas "neskuebla" (12:28). Daniel ankaŭ diris en 2:44, ke la regno neniam detruiĝos, kaj staros eterne.

Tiele aperas la regno de Dio, firma, glora, eterna. Tiele aperas la regado de Dio.

Proklamo.

Tiun regadon, tiun regnon, Dio volas anoncata, proklamata. Kaj tio estis la celo de Jesuo, de la apostoloj, de la Eklezio, de ni.[3] Sed tiu senĉesa predikado estis ne tiel evidenta. Kaj la disĉiploj frontis problemegojn por komrpeni ĝin, kaj poste komprenigi ĝin. Anonco, proklamo de la regno estis ankaŭ nomata prediko de la Evangelio, de la Bona Novaĵo pri la regno de Dio.

Strange, kaj por kelkaj skandale, estas vidi, ke al kelkaj "estas donite scii la misterojn de la regno de la ĉielo" kaj ne al aliaj (Mat 13:11). Aĥ ! tiuj disputoj pri la antaŭdestino !

Kion do por ekkoni la Evangelion. Estis donitaj signoj kaj paraboloj, bildoj. La signoj, la mirakloj, ne sukcesis konvinki ĉiujn (Mat 12). Poste venis la paraboloj (Mat 13-25).

La regno estas komparita al homo kiu semas (Mat 13:24), al sinapa semeto (v. 31), al fermentaĵo (v. 33), al trezoro (v. 44), al komercisto (v. 45), al reto (v. 47), al reĝo (18:23), al domo-mastro (20:1), al reĝo denove (22:2) kaj al dek virgulinoj (25:1). Tiel malsamaj komparaĵoj ! Kio komuna ? Eble ke, tra ili estas pri-skribata tutsimple maniero vivi, sin konduti. Sed tamen, demandoj restas. Kial post la trezoro, la komercisto kaj ne la perlo ?

Kiel do eblas proklami la regnon, prediki la Evangelion ?

Sed ni memoru tiu versiklon de Paŭlo :

> "Ĉar la regno de Dio estas ne en parolo, sed en potenco." (1 Kor 4:20)

Vokitaj.

> "(Dio), kiu vin vokas en Sian regnon kaj gloron." (1 Tes 2:12)

La regnon de Dio, al kiu oni estas vokita, oni eniras (2 Pet 1: 11), sed aliaj ankaŭ eniras ĝin, eĉ perforte (Mat 11:12). Tamen, tiuj eniroj ne estas senkondiĉaj. Oni trovas en la Nova Testamento liston da tiaj kondiĉoj, ĉu pozitivaj, ĉu negativaj.

Kiel infano, oni alproksimiĝu (Mat 19:14 ; 18:1 ; Mk 10:15), kaj





tiun eniron povas fari nur la konvertitoj, nur tiuj kiuj travivis novan naskiĝon.

> "Se vi ne turniĝos kaj ne fariĝos kiel infanoj, vi neniel eniros en la regnon de la ĉielo." (Mat 18:3)
>
> "Se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio." ... "Se homo ne estas naskita el akvo kaj la Spirito, li ne povas eniri en la regnon de Dio." (Joh 3:3,5)

Eĉ tio ne sufiĉas, bezoniĝas (2 Tes 1:4-5) elportado, persisto, kaj ankaŭ plenumo de la volo de la Patro (Mat 7:21). Ĉu malfacila ? Sed atendu, nun venas la negativaj kondiĉoj.

Tio estas preskaŭ neebla al riĉuloj (Mat 19:24). Tamen, ne tute neebla. Tiu, kiu rigardas malantaŭen, ĉe la plugilo,same ne taŭgas por la regno de Dio (Lk 9:62). En kio mi sentas min riĉa, kio povas reteni mian menson malantaŭen ?

Jes ja, estas ankaŭ tiuj, kiuj ne povos kompreneble heredi la regnon. Ili estas malĉastuloj, idolanoj, adultuloj, ktp. (1 Kor 6: 9-10). Ili estas malĉastuloj, malpuruloj, aviduloj, ktp. (Efe 5:5). Kaj inter tiuj mi ne estas, ĉu ?

Ene, bone, ekster, malbone, sed proksime, terure (Mk 12:34).

En la tempo.

Se mi ne povas esti en aŭ ekster la regno, ĝi do estas nuna, ak-tuala. Tion diris Jesuo al kelkaj :

> "Jen, la regno de Dio estas inter vi." (Lk 17:21)
>
> "... ilia estas la regno de Dio." (Mat 5:3, 10)

Tamen same, la Nova Testamento atendas la regnon de Dio (Mat 3:2 ; 10:7 ; Mk 15:43 ; Lk 19:11 ; 21:31 ; 22:16,18 ; Jak 2:5). Ĝi venos, estas atendata, promesita, proksima.

Pro la netuta konvink-povo de ambaŭ serioj de tekstoj, mi povas diri, ke mi restas kun mia demando, ĉu nuna, ĉu baldaŭa ?

Eskatologio ?

Eskatologio : pri la lastaj tempoj.

Ĉu al tio rilatas la regno de Dio ?

Certe en la Nova Testamento estas aludata la regado de Kristo. Sed mi preferas diri, ke tiu regado de Kristo estos la venonta ma-nifestiĝo de la regno de Dio, ol diri ke ĝi estos la regno de Dio mem.

La kristano, disĉiplo de la Sinjoro estas pasanto tra nia mondo, fremdulo sur nia tero, civitano de alia regno, sed li ne estas

blindulo. Nia Sinjoro metis en la mondon, kvankam ni ne estas de la mondo (Joh 17:15-16). Kaj tiu regno de Dio al kiu ni iras, sed ankaŭ en kiun ni eniris, tiu regado de Dio super ni tra la Sankta Spirito, montras al ni kie atesti, proklami kaj helpi.

Ni do evitu du teniĝojn. Nia mondo ne estas la kontruenda regno de Dio, kaj, nia mondo ne estas tiu malpurejo, kiun ni ne atentu. Ni vivas en la mondo, kie ni manifestu la pacon kaj justecon de Dio, sed tia agado ne fariĝu nia vivkialo.

La regno de Dio, ĉeestanta en la kristano, riveliĝas per la fruktoj de la spirita vivo. Tiele ĉirkaŭe, per signoj, per paroloj, la Evangelio de la Regno de Dio estas anoncata, vivata, kaj aliaj povas eniri en ĝin.

Sed la festo estos kompleta, kiam, finfine ni ĉiuj estos kune ĉirkaŭ la tablo de la nupta festeno (Mat 8:11 ; 26:29 ; Lk 14:15).

Kaj tiun ĉi festenon ni nun kune festas, kiam ĉirkaŭ la tablo ni dispecigas la panon kaj transdonas la pokalon. Tio estas la celebro de la regno de Dio, nuna, baldaŭa kaj lasttempa, heredota kaj vivata, proklamata kaj enirata.

Venu Via regno !

Philippe Cousson, Francujo

NOTOJ

1. Klientelismo : socia sistemo, kie de familio (patricia) dependas klientelo, ekonomie, politike, ktp., ĉefe ĉirkaŭ la Mediteranea maro.

2. *Christianity Today*, 1987, february 20, pp. 17-23 kaj 1989, april 21, pp. 38-40.

3. Mat 4:23 ; Lk 4:43 ; 9:2 ; 9:60 ; Agoj 1:3 ; 19:8 ; 20:25 ; 28:23.

Philippe COUSSON (1953), franco, lerneja bibliotekisto, vic-prez. de KELI, redaktoro de *Evangeliaj Kajeroj*, presbitero en reformita komunumo, edzo kaj patro de 3 infanoj.





# HOMOJ KONSTRUAS AL SI MALREGNON

Unu el la multe diskutataj tezoj en la kurso "teologio kaj ekonomio", kiun mi sekvas, tekstas : Teologio sen ekonomio estas nehumana (sen-homa) kaj ekonomio sen teologio estas blasfema (sen-dia).

## EN LA KOMENCO

Eklegante klasikan verkon oni plene atentu la unuan frazon, kiu ofte resumas nuksoŝele la tutan libron ! Nun mi prenas en la manojn la Libro de l' libroj, kaj mi buŝe legas, aŭ pli bone orele aŭdas, kiel uverturan propozicion :

"En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron."

Notu bone, ke nur pri la unua vorto BEREŜIT, kiun oni ĝenerale tradukas per "en la komenco", bibliistoj plenverkis kompletan bibliotekon... Ĉi tie mi lasas ekster konsidero gramatike defendeblan tempan sencon (responde al la demando : Kiam Dio kreis ?). La radikvorto ROŜ (*reŝ-alef-ŝin*) signifas kapon ; la ĉefan parton de la korpo. La instruo evidentas : Dio estas la Ĉefo : kiel Princo Li majeste kreas kaj kiel Iniciatoro Li inaŭgure komencas. Kreado apartenas, por tiel diri, al la Dia ofico. Dio unuas kaj parolante, farante, lumigante, ordigante, apartigante, konstruante, servante kaj konservante Li ekas la historion. Li kreas, t.e. donas destinon kaj vokas al estonteco, la ĉielon kaj la teron. Li havigas sencon kaj direkton al Sia liberiga agado.

Kaj kia estas tiu destino ? Duoble trifoje ni aŭdas en la unua ĉapitro de Genezo : "ĝi estas bona" kaj laste, por la sepa fojo, "gi estas tre bona." Pri la karaktero de la adjektivo ni sekve povas esti tute certaj. Ĉiu kaj ĉio atingos sian destinon ! Ĉe Dio ni estas en bonaj manoj, sed kondiĉe ke Li estu kaj restu iniciatoro kaj donu nomon (= rolon, taskon) al la homo. Ĉio mala estas religio paganisma. Kaj ade montriĝas kiom religiaj ni estas. Terure religiaj ! Ĉar ni aŭdacas herezule falsigi la inspiritan kaj inspirantan tekston, interpretante ĝin laŭ speco de "mono-teismo", proksimume : "Per la kapitalo la homo alikreis al si mondon." Kion ni iniciatas ? Ni nomu ĝin la kontraŭo de paradizo kaj esperantujo ; infero, kiun kelkaj ekspluatistoj kaj mon-sinjoroj maljuste kaj diverssorte dividas kun multaj sklavoj kaj povruloj. Nu, se kredantaj homoj senkritike kaj konfuze (Babel !) miksas Kap-italon/monon kun Kapo/Dio, ni kreas religion sub la absurda nomo de MONO-TEISMO, kio estas multe pli ol interesa vortoludo, ĉar terure religiaj ni estas...

## DIO ANTAUDESTINAS

Sed kiun vojon, kian metodon Dio elektas ? Parolante pri destino, mi ne intencas aludi iun severan doktrinon pri antaŭdestinismo, kvazaŭ Dio kondamnus la amason al eterna morto ĉar Li estas justa, kaj elektas nur kelkajn al la paradizo ĉar Li estas kompata. La metodo, kiun Dio aplikas, iusence estas eĉ pli rigora. Li elektas unu. Unua-ulon. Li komencas per unu, kiu estu garanti(ant)o por ĉiuj. La hebrea vorto REŜIT signifas primicon, unuaaĵon (Rom 8:23). S. Paŭlo nomis Kriston, kiu releviĝis el la mortintoj, la unuaaĵo de la dormantoj (1 Kor 15:20-23).

En la Sankta Skribo temas pri tiu esenca demando : kiu estas la REŜIT, tiu ido unue naskita ? Por Paŭlo, kiun mi citis, la respondo ne estis enigma. Ankaŭ ne por Johano, kiu diris, ke "En la komenco estis la Vorto" (unua frazo de lia libro !). Laŭ lia evangelio, Jesuo estas la Vojo, la metodo, kiun Dio preferas por porti ĉiun kaj ĉion al ilia destino : Jesuo, la ĉefa (= ROŜ !) misiisto kaj savmesaĝisto, en kiu plenumiĝis la promeso. Li estis "unu (homo) por ĉiuj (homaro)," la sola, kiun Dio antaŭdestinis kaj elektis. Estis, estas kaj estos. Li analogias kun tiu, kiun la Kreanto emfazis en Genezo 1:27 : "Ni kreu hom(ar)on en Nia bildo, laŭ Nia similaĵo." En antikvaj latinlingvaj bibliomanuskriptoj antaŭ-vulgataj ni trovas interesajn tekstvariantojn, kiuj indikas filon, vorton aŭ Kriston kiel REŜIT :

> "*... sive in principio sive in capitulo, in Christo... ; ... hic principium filium taxans in quo Deus Pater fecit caelum et terram... ; ...omnia ergo in principio id est in Christo fecit Deus... ; ...in hoc ergo principio, hoc est in verbo suo, Deus caelum et terram fecit...*" k.a.

Se estas vero, ke Dio konstruas Sian Regnon en aŭ per Sia Filo, ni do bone atentu Lin ! Li estas Tiu, Kies nomo estas Di-bildo kaj Kiu montros al ni la vojon al nia destino bona, tre bona. Denove : kondiĉe ke ni ne fariĝu iniciatoroj, kapoj, dioj ; ne konstruu murojn kaj levu turojn, fie praktikante politikologion kaj ekonomikon, t.e. sen aŭ aparte de teologio, kaj tiel donante al ni nomon, al la kap-italo mono-polon, kaj monon al kapitalistoj.

## DIO PENTAS

Sed ĝis la patriarka periodo - "La Eternulo diris" kaj "kaj Abram iris" (Gen 12:1-4) - ni aŭdas, ke la hom(ar)o volas "fariĝi kiel unu el Ni" (3:22), eliminas sian fraton (4:8) kaj havas tiom malbonajn pensojn kaj intencojn en la koro, ke preskaŭ ĝenerala kaj radikala ekstermo necesiĝas kiel efika terapio flanke de Dio, Kiu pentas ke Li kreis la homojn (6:5-7). Kaj tiam komenciĝas la praparabolo, kiun mi klopodis plej fidele (labor)traduki.





1 KAJ FARIĜIS<br>
LA UNIVERSA TERO<br>
lipo / lingvo UNU<br>
kaj vortoj / faroj UN-IKAJ<br>
2 KAJ FARIĜIS<br>
kiam ili migris el oriento<br>
kaj trovis valon / ebenaĵon<br>
en la lando Ŝinar<br>
kaj ekloĝis tie<br>
3 kaj diris viro<br>
al proksimulo sia<br>
VENU<br>
ni fa-briku brikojn<br>
kaj fajrumu jefajre<br>
kaj estis por ili<br>
la brikŝtono al konstruŝtono<br>
kaj la argilo estis por ili kalko<br>
4 kaj ili diris<br>
VENU<br>
ni fa-briku al ni urbon kaj turon<br>
kaj ĝia kapo en la ĉieloj<br>
kaj ni faru al ni nomon<br>
por ke ni ne disiĝu<br>
SUR VIZAĜO DE LA UNIVERSA TERO<br>
5 kaj malleviĝis LA NOMO KAŜITA<br>
por vidi la urbon kaj la turon<br>
kiun fa-brikis<br>
la infanoj / fabrikitaj / de la hom(ar)o<br>
6 kaj diris LA NOMO KAŜITA<br>
Jen popolo UNU<br>
kaj lipo / lingvo UNU<br>
al ili ĉiuj<br>
kaj ĉi tio la komenco de farado<br>
kaj nun ne malfacila al ili ĉio<br>
kion ili pripensas por fari<br>
7 VENU<br>
ni malleviĝu<br>
kaj babiligi / konfuzu tie<br>
ilian lipon / lingvon<br>
tiel ke ne aŭdos viro<br>
lipon / lingvon<br>
de proksimulo sia<br>
8 kaj disigis LA NOMO KAŜITA<br>
ilin de tie

SUR VIZAĜO DE LA UNIVERSA TERO
kaj ili ĉesis fa-briki la urbon
9 tial oni vokis ĝian nomon
babel
ĉar tie babiligis / konfuzis
LA NOMO KAŜITA
lipon / lingvon
DE LA UNIVERSA TERO
kaj de tie disigis ilin
LA NOMO KAŜITA
SUR VIZAĜO DE LA UNIVERSA TERO

## FORLASI LA ORIENTON

Ho, kiom kara kaj valora estas ĉi tiu rakonto al esperantistoj ! Ĉu ĝi ne klare pruvas, ke lingvo kapablas unuigi kaj ... disigi ? Ni aŭdas, ke ĉie regas unueco laŭ lipo kaj lingvo, laŭ vortoj kaj faroj. Ĉu la unikeco de la Torao, kiun la universa tero buŝe konfesas kaj fare laŭvivas ? Ideala situacio, ĉu ne ? Jen la perfekta Regno de Dio : homa vivo en lando, kiu situas en la oriento, lulilo de biblia saĝo kaj elĉiela mesaĝo. Ĉu ne estus revo, vizio, tiu stato de plena paco, ŜALOM, konkordo, justeco, fideleco ? Kiel ajn estu, tia unika situacio montriĝas ege danĝera, ĉar homoj decidas turni la dorson al la oriento kaj malleviĝi al valo por ĝuste tie konstrui murojn kaj levi turon. Kaj tiel la vorto dekomenca, unu vivanta lingvo, enkarniĝas kiel humanecon sufokanta kaj voĉojn estinganta urbo kaj rigidiĝas kvazaŭ monolita koloso. Tiel teologio degeneras en politikan ekonomion. Ni bone distingu !

En la parabolo homoj postulas socian "ordon", de Dio senradikiĝintan. Estas la vojo elorienta de konkordo al la forĝado de konkordatoj. Tiel fariĝas ... Jen la homa historio, nia tragiko ! Dufoje : VAJEHI, VAJEHI. Homoj evidnete sopiras fari al si nomon (monon), malakceptante la nomon, kiun ili jam ricevis en Genezo 1: 26 : bildon de Dio. Ni faras al ni nian propran religion. Dian Parolon kaj ordigon de la kunvivado ni aranĝas laŭ niaj interesoj kaj profitoj. Ni ne faras al ni nomon, famon, reputacion, sed kapitalajn urbon kaj turon, t.e. ideo-logion, kiel bazon kaj subkonstruon por nia politika kaj ekonomia agado. Ni jam legis pri Kain, kiu konstruis urbon kaj donis al ĝi nomon (Gen 4:17), sed ĉi tie temas pri tio, ke la homo deziras fariĝi Dio, volas atingi la ĉielon (revenas la ROŜ de BEREŜIT : "la kapo en la ĉieloj"). Ni volas vivi kiel gigantoj kun la kapo en la nuboj (atentu la idealistoj kaj mondopliboniigantoj !), anstataŭ dupiede resti sur la agro, el kiu ni estas prenitaj... Dufoje la homoj konspire kaj provoke aŭdacas paroli : VENU - VENU, kaj poste replikas la Eternulo kun la kvarkonsonanta





KaŜita Nomo. Tiu devas malleviĝi por povi atingi la homojn memini-ciatemajn, kiuj per turoj levotaj neniam povas pliapudigi Lian loĝlokon, al kiu Li kreante donis destinon (Gen 1:1).

## NE ESTAS SIMPLA RAKONTO

Oni ne opiniu, ke la parabolo pri la urbo kaj la turo estas "simpla rakonto, kiun ni jam longe konas." Nepre ne temas pri mitologiaĵo. La aŭdantaro serioze distingu kaj klare analizu. Ni klopodu kapti la profetajn kaj eskatologiajn tavolojn, ilin zorge "elfosante". Ĝi povus esti tre konkreta kaj dolora priskribo metafora de la unua (malsukcesinta) revolucio. Certe ĝi estas ekstreme aktuala : bilde instruas pri politika reĝimo kaj socia sistemo, en kiu unu voĉo laŭte ordonas kaj tuta kolektivo blinde obeas. Ni konu nian historion ankaŭ nuntempan !

La kerna komisiono al la homaro estas servi kaj konservi la teron (Gen 2:15), sed kion ĝi faras ? Ĝi konstruas al si ĉirkaŭmuritan urbon, POLIS, sklavigan kolektivon, en kiu ne estas loko por homoj liberaj, sennomaj, pacamaj, mizeraj, handikapitaj, kies lipoj parolas malsaman lingvon kaj kies manoj teksas alian agopatronon (inter kiuj eble kaŝiĝas la Filo). Kaj ĝi faras mon-um-enton : turon kun alta kapo, elitan klason, kiu posedas la kap-italon koste de proletaro (denove : inter kiu eble troviĝas la Filo), kies sola havaĵo estas riĉa idaro. Alivorte : ĝi komencas agi politike kaj ekonomie en la plej fia senco de la vorto kaj ne kiel la Biblio parolas pri la POLIS Jerusalem kaj konas la terminojn 'OIKONOMIA kaj 'OIKONOMOS. Ĝi iniciatas konstrui socion funditan sur kapitalo anstataŭ sur la Kapo, Dio kaj la Vorto (= Kristo). Estas vere mistero kial homoj emas malkonfesi la reĝecon de Dio kaj preferas strukturi kaj organizi kunvivadon for de Li kaj kontraŭ si mem, t.e. malebligas, malhelpas, bremsas la alvenon de la dia reĝeco kaj de la mesia regno (la terminon "regno" ni ne tro geografie kaj teritorie komprenu !).

## DIO KONSTRUAS DOMON

Nia parabolo, kiu plenas de verboj spirantaj arogantecon, fieron, malhumilecon, konspiron kaj komploton, estas evidenta pruvo, ke la homo ne agnoskas Dion kiel Ĉefkonstruanton. Sekve pravas la 127-a psalmo :

> "Se la Eternulo ne konstruas la domon (la unua litero de la Biblio nomiĝas BET = domo), tiam vane laboras super ĝi ĝiaj konstruantoj; se la Eternulo ne gardas la urbon, tiam vane maldormas la gardanto." (v. 1)

Alia psalmo (118) kantas pri ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj, kaj kiu fariĝis ŝtono bazangula (kapo, ROŜ, de la angulo), de la

Eternulo, la Iniciatoro kun la kaŝita nomo, "ĉi tio fariĝis ; ĝi estas miraklo en niaj okuloj." Kaj kiu estas tiu ŝtono ? La Evangeliistoj parolas pri ĝi (Mat 21:42 ; Mk 12:10 ; Lk 20:17), kaj ankaŭ S-ta Petro (Agoj 4:11 ; 1 Pet 2:7).

## BONE ANALIZU

Se ni volus vere iom kompreni, kiom riĉa kaj profunda estas la parabolo pri la miskonstruanta homaro, ni bezonus ĝin legi en la hebrea originalo. Tra la tuta teksto kaŝiĝas filo (BET-NUN). Sepfoje (!) li retroviĝas en la radikoj ŝton', (fa)brik', konstru', kaj unufoje tre eksplicite, kiam la Eternulo malleviĝis por vidi la urbon kaj la turon, kiun konstruis (fabrikis) la infanoj (fa-brik-itaj) de la hom(ar)o. Ŝlosilaj vortoj abundas : unu, universa, lipo, vizaĝo, ŝtono, briko, konstrui, konfuzi, disiĝi/igi, malleviĝi, kaj nelaste la imperativa formo de veni. Ni bone uzu ilin por akre analizi la teskton kaj... nian socion. Ni alte levas nin kaj konsekvence Li devas profunde malleviĝi por viziti nin kaj venigi nin kaj vanigi la monstran planon : krei malesperantujon, metropolon en kiu homa vivo ne eblas. Sed pri la turo, kaj tio estas ege frapanta kaj interesa, Dio silentas. Ĉu Li toleris ĝin ? Toleris en formo baptita ? Ĉu li deziras, ke Liaj bildoportantoj ne intermiksu sed firme ligu teologion kaj ekonomikon, kiel estas intima interligo inter Dio kaj homaro ? Ke ni humanigu la kapitalan monofluon tiel, ke ĉiu homido povu inde loĝi kaj vivi ?

## KONSTRUI SUR LA REŜIT

La Eternulo, Kreanto kaj Humaniganto de la homa historio, identigas Sin kun Filo, kiu solidariĝis kun la homoj plej subaj, sen tegmento, sen perspektivo, sen alta socia stato, sen digna pasinteco kaj esperplena estonteco, sen radikoj kaj revoj. Se ni konstruos sur Li, ni alvenigos la regnon promesitan. Per kaj ĉirkaŭ Li la reĝeco de Dio unu kaj unika realiĝos, ĉar tiam homoj parolos per unu lipo laŭ la humanaj limoj kaj limigoj de Torao, kaj agos per unikaj vortoj (faroj de justeco).

## VENU SUR MIAN VOJON

Ni daŭre direktu nin al la Nomo Kaŝita kun la urĝa petado, ke (re)venu la Filo por konduki nin orienten por ekkonstrui loĝlokojn vilaĝe afablajn, en kiuj ĉarmaj dometoj ŝultro-ĉe-ŝultro interligiĝas. Li unuigu nin al fidela gefrataro, kiu konkorde vivas el unu Libro laŭ modelo vivanta kaj viviganta. Necesas fide kaj esperplene atendi novan ĉielon kaj novan teron kun sankta urbo kiel umbiliko : surmonta Jerusalem, malsupreniranta el la ĉielo, kies lumo estas simila al ŝtono (!) plej altvalora (Apo 21).





Kiam ni malfermas libron, ni akurate atentu ne nur la unuan frazon, sed ankaŭ la lastan. Fininte, sekve, la ferman verkon de la Biblio, kiu apokalipse malkaŝas al ni la Filon, ni kiel eĥon kaj gracon aŭdas en la oreloj : Venu, Sinjoro Jesuo !


"Levu, urbaj pordegoj, viajn kapojn (!)
kaj leviĝu, pordoj antikvaj,
por ke eniru la Reĝo de Gloro,...
...al kiu plenrajte apartenas
la universa tero kaj ĝiaj loĝantoj." (Psa 24:7,1)

Por ke eniru la Reĝo de Gloro, faranta interligon kun sia REŜIT, kiu invitas ĉiun homidon senescepte per Venu sur mian vojon kaj fariĝu vi mem vojo por aliaj !

Jacques Tuinder, Nederlando

Jacques TUINDER (1933), nederlandano, studis filozofion kaj teologion, poste finis en Sociala Akademio, laboras kiel klinika social-helpisto. En 1966 iniciatis la helpagadon E3. Partoprenas de dudek jaroj en ekumena biblia rondo.





Rita Rössler





# LA REVENO DE JESUO, MOTIVO POR LA EKLEZIO

Ĉu Jesuo revenos ? Kiel estus, se li venus same kiel li venis la unuan fojon ? poetoj luktis kun tiu problemo. Kristano devas ofte pripensi ĝin.

Kio okazus, se Jesuo aperus en via lando nun ? Li estus moderna homo, samnaciano via el vialandaj prapatroj, sed alimaniere ĝuste kiel Jesuo la Nazaretano.

Naskita de malriĉulino, nomita per ordinara nomo, edukita por fari ĉiutagan laboron ĝis la trideka jaro de la vivo, kiam li komencis paroli kaj labori tiel, kiel neniu ordinara homo povus.

Unue en iu vilaĝo historioj iom post iom disvastiĝus, rakontite kun miro aŭ skandale, kun admiro aŭ moke, kun ofendiĝo aŭ ĝoje. Liaj vortoj estus portataj de unu persono al alia, facile kompreneblaj eĉ simplaj, sed tamen absurdaj ; oportunaj, kvazaŭ li scius ĉion, ĉiun detalon de la ĉiutaga vivo, ĉiun unuopan demandon, sed tamen tiel strangaj, kvazaŭ li venus el alia lando, ne, el alia mondo.

Li venus al la ĉefurbo de via patrujo kun kun kelkaj fiŝkaptistoj, kun homamaso, kiu enhavis ĉiuspecajn personojn, el kiuj kelkaj havas hontindan pasintecon kaj malmultaj estas granduloj.

Li irus tra la stratoj kaj placoj kaj neniu povus lin eviti. Subite en plej luksa hotelo la diskoteko eksilentus kaj la glaso haltus survoje al la lipoj de la trinkanto. Li rigardus tiel profunde, ke ĉio estus evidenta al li.

Subite en la banko li vidiĝus inter la klientoj, li demandus nenion, sed scius ĉion kaj ĉiu falsa bankbileto aŭ akcio komencus bruligi la fingrojn de la tenanto. Ili ekbrulus tiel kaŭzante brulvundon, kiun oni neniam povos forigi, krom se liaj okuloj estingos la brulon aŭ lia mano forigos la vundon.

Unu tagon en la hospitalo, alian tagon en la parlamentejo, ĉiutage en la katedralo. neinvitite li subite troviĝas apud mi, apud vi.

Malsanuloj kuraciĝus, pekantoj pardoniĝus, oficistoj kaj ministroj montriĝus tiaj, kiaj ili estas.

Kion farus la Eklezio ? Kion farus la ministro pri sanecaj aferoj ? Kion farus la parlementanoj, la policanoj. Kion ni farus al li, ni bonaj civitanoj de nia patrujo kaj urbo ? Ĉu ni rekonus lin

kaj ĉu li agnoskus nin ?

Sed efektive li ne revenos tiumaniere. Jesuo Kristo ne tiel aperos, nek en via lando, nek en la mia, nek en iu ajn lando.

Kelkfoje oni aŭdas onidirojn, ke Kristo aŭ lia ekvivalento efektive aperis. Tiaj famoj kiam pli zorge ekzamenitaj trompis al multaj la esperojn. Kristo ne reaperas.

Li jam venis. La provo, kiun la homoj travivis tiam ne ripetiĝos. Ni malsukcesis kaj ne povos travivi ĝin denove. Efektive ne necesas, ke ni denove travivu ĝin, ĉar Dio sukcesigis nin, eĉ kiam ni mem malsukcesis.

La hinduoj parolas pri dia mesaĝisto, kiu aperos post iom da tempo por ripeti la samajn veraĵojn, ĉar la ekzisto estas senfina cirklo eterne ripetiĝanta. La mondo estas sen komenco kaj sen fino. Ĝi havas neniun finfinan celon.

La Biblio havas tute alian vidpunkton. Laŭ ĝi la historio de la mondo havas komencon kaj finon ; ĝi estas limigita tempo kaj rondiras unu centron, Kriston, lian alvenon kaj lian venkon. Li plenumis la taskon, kiun la Patro donis al li, unufoje por ĉiam. Li ne revenos. Fare de li nenio estas ripetenda kaj neniu alia devas ludi tiun rolon.

Li mem esprimis tion jene :

"Gardu vin, ke vi ne estus erarigitaj ; ĉar multaj venos en mia nomo, dirante : Mi estas ; kaj : la tempo proksimiĝis ; ne sekvu ilin." (Lk 21:8)

Ni do devos ne atendi, ke Jesuo trairos la stratojn de El Qāhira (Kairo) aŭ Paris aŭ London aŭ iu ajn alia urbo por faligi kaj restarigi nian generacion, kiel okazis ĉe la generacio de Kajafas kaj Pilato. Ni ne respondecos pri la sama sinteno al li kiel ili havis. Kion ili faris al li, tion ankaŭ ni faris. Ilia kulpo jam estas nia kulpo.

Jesuo ne ripetos la taskon, kiun li plenumis per siaj krucumiĝo kaj releviĝo. La nova kreaĵo jam ekzistas kaj eterne ekzistos. Li ja estas inter ni ; li efektive neniam denove forlasis nin.

"Jen, mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo." (Mat 28:20)

Li estas ĉi tie en sia Spirito, en sia Vorto, en la sakramento de siaj korpo kaj sango. Li troviĝas en sia Eklezio. Kie ajn du aŭ tri kunvenas en lia nomo, tie li estas. Kie oni predikas lian vorton, tie li mem parolas al vi. Vi renkontas lin ĉiutage en viaj kunhomoj. Tion li mem diris :





"Kiom vi faris al unu el ĉi tiuj miaj fratoj la plej malgrandaj, tiom vi faris al mi... ĉar mi malsatis, kaj vi donis al mi manĝi ; mi soifis kaj vi donis al mi trinki ; mi estis fremda, kaj vi gastigis min ; nuda kaj vi vestis min ; mi malsanis, kaj vi vizitis min ; mi estis en malliberejo, kaj vi venis al mi." (Mat 25:40,35-36)

Li do estas ĉi tie, pli proksima al ĉiu el ni ol li povus esti, se li reenkarniĝus. Li unufoje por ĉiam teksis sian vivon en la vivon kaj ekziston de la tero. Ĉiumomente ni staras antaŭ li, ĉiuhore ni devas elekti aŭ akompani lin aŭ forkuri de li, esti liaj sekvantoj aŭ lin malagnoski, ĝojigi lin aŭ lin malgajigi. Li do estas kun ni, ĉar li deziras

"ke ĉiuj estu savitaj kaj venu al la scio de la vero." (1 Tim 2:4)

Li do estas kun ni ĝis la maturiĝo de la mondaĝo.

Jes, ĝis tiam. Ĉar la mondo finiĝos kaj tiam li venos. Sed ne kiel li venis la unuan fojon, ne kiel unu el ni, ne en humileco kaj laŭ la bildo de homoj.

"Kaj aperos la majesto de la Eternulo ; kaj ĉiu karno kune vidos, ke la buŝo de la Eternulo parolis." (Jes 40:5)

Ne nur tiuj, kiuj kredas, ne nur tiuj, kiuj atendis kaj sopiris al lia veno, sed ĉiuj. Ne nur tiuj, kiuj amis lian revelacion, sed ĉiu karno. ne nur tiuj, kiuj estas baptitaj, sed ĉiuj.

Tiam oni rememoros ĉion. Mi rememoros mian nunan staton kaj vi rememoros, kion vi nun pensas. Ĉio malkaŝiĝos - la leptoj de la vidvino kaj la profito de la procentegisto, la odoraĉo de trompado kaj la aromo de la amo. Ĉio vidiĝos rilate min kaj vin tiel kiel Dio ĝin vidas. la tero malaperos, la tempo finiĝos, la unua generacio kaj la lasta staros kune en la eterna spiro de la ĝojo de Dio kaj de Lia malĝojo kaj restos neniu loko en via konscio por io krom la Filo de homo venanta kun potenco kaj granda gloro - kaj kia vi estos ? Kiel pasanta ombro ne povante fuĝi, aŭ kiel lumradio el li ? Taŭga por tiu perfekta mondo, aŭ kondamnita al disiĝo de Dio ?

"La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos." (Mat 24:35)

Tion li mem diris kaj de tiam forpasis preskaŭ dudek jarcentoj. La tero ankoraŭ ekzistas kaj la ĉielo ne falis sur nin. Sed liaj vortoj : ĉu ili ne forpasis ?

Kion vi scias ?

Pri la estonteco vi scias nur tion : la ĉielo kaj la tero, kiuj estas via nuntempa mondo, forpasos kaj malaperos de viaj okuloj.

Ĉio, kio plenigas vian menson de tago al tago vaporiĝos kaj malaperos. Ĉio silentiĝos, ĉiuj tumultoj kaj ĉiuj voĉoj malpliiĝos kaj eksilentos fine en la malproksimo, la fora mallumo, kiu kovros ĉi tiun teron kaj ĉion sur ĝi. Vin ĉirkaŭbrakos profunda silento. La tero pluiros laŭ sia orbito lasante vin sola kun la vivo, kiun vi jam vivis, la konscienco, kiun makulis tiu vivo, tiu konscio, kiu ne pereas sed havas lokon nur por la fakto, ke ĝi devos renkontiĝi kun la Filo de homo.

Tiam vi scios ion alian : ke Liaj vortoj ne forpasis, ĉar Liaj vortoj estas veraj.

Via tempo havas limojn. Vi estas infano de la tempo. La morto estos sendita por venigi tion, kio apartenas al la Kreinto. Kion vi donos al Li ? Kiel diris la psalmisto :

> "Kion mi redonu al la Eternulo por ĉiuj Liaj bonfaroj al mi ?"

Kaj tuj venas la respondo :

> "Mi levos la pokalon de savo kaj mi vokos la nomon de la Eternulo." (Psa 116:12-13).

Tiu demando ofte renkontos nin sur la vojo de la vivo kaj finfine vi ne povos ĝin ignori. Vi mem devos malkaŝi la respondon faritan de via vivo, vi devos ĝin malkaŝi en la lumo de tiuj vortoj, kiuj estas eterne veraj kaj neniam forpasos. Kiu povos stari antaŭ la Filo de homo ?

Kio povas ekzisti en via vivo kaj la mia, kio estas valida kaj pura en la lumo de la eterno ? Kiuj elementoj en niaj vivoj estas tiaj, ke ni povas senhezite kaj kuraĝe fronti ilin. Eĉ se tiaj ekzistus, kiel ili kontraŭpezus la aliajn bonfarojn, kiujn ni ne sukcesis fari ĉiutage ?

Tiu, kiu trovis la gravecon de tiu demando, jam renkontis la Filon de homo vizaĝon kontraŭ vizaĝo kaj vidis prilumita de Lia sankta lumo la registron de sia vivo publikigita. Li antaŭ gustumis la eternecon ĉi tie en la tempo. La Filo de homo venis por savi kaj pardoni la pekintojn, por suferi ilian punon kaj kaŝi ilian kulpon per sia senkulpeco.

Tiu, kiu iras en la direkto al la eterneco maldorma, scias, ke li devos teni tion, kion Jesuo-Kristo penegis havigi al li. Neniun alian li povas fidi, neniu alia fondaĵo ekzistas, sur kiu li povas konstrui. Tiu, kiu scias kiu Jesuo Kristo estas, konas la ĝojon, kiu troviĝas en Liaj vortoj :

> "Rigardu supren kaj levu viajn kapojn, ĉar via elaĉeto alproksimiĝas." (Lk 21:28)





Aŭ en alia versiklo :

> "Nun estas la horo por leviĝo el dormo ; ĉar nun nia savo estas pli proksima, ol kiam ni ekkredis." (Rom 13:11)

La signifo de tio estas jena : Ĉio, kio rememorigas nin pri la efemereco de la mondo, estos signo, kiu neniam forpasos. Ĉio, kio estas malfacila, ĉia aflikto, kiu vin atakas, devus rememorigi vin pri lia venko kaj lia regno. La tuta historio havigis novan signifon. La tuta kreitaro kune ĝemas kaj naskodoloras. Nova ĉielo kaj nova tero estas naskataj, la Sinjoro alproksimiĝas. persekutoj, militoj, malsatoj kaj pestoj, ĉiuspecaj katastrofoj, estas la agoniado de la malamiko, kiun Kristo venkis.

Kiam Kristo venis, ĉio ŝanĝiĝis. La bona sed malpurigita kreitaro estis fandita kaj la oro estis forigita de la malvaloraĵoj, la lumo de la mallumo, kaj ni povas anticipe ĝui la plenumiĝon de la promeso pri nova ĉielo kaj nova tero kaj ke la tuta kreitaro leviĝos prefekta kaj freŝa kaj sana.

Jesuo estas la Reĝo de la venonta nova universo, kie loĝas la justeco, kaj kiu estas naskata kaj estos malkaŝita kun li en gloro.

Nun li venas al vi en siaj vortoj. Ĉu vi permesos tiujn vortojn vin preterpasi ? Ĉio, kio apartenas al li, ricevos la eternan venkon. Tio estas la motivo de la Eklezio.

Hugh Martin, Britujo

Hugh MARTIN, brito, skota pastoro, ĵus revenis de egipta restado por intereklezia kunlaboro, predikis en la KELI-kongreso en Edinburgh (1977).

## V O Ĉ O J   K R I S T A N A J

serieto celanta aŭdigi la plej diversajn voĉojn
de kristanismo:
de liberala ĝis ortodoksa
de rom-katolika ĝis protestanta
sendepende de dogmaj limigoj
depost Prakristanismo ĝis la nuno
intern-eklezie, ekumene, interreligie kaj tuthomare

aperis ĝis nun nur kelkaj numeroj. ĉiu estas plene memstara. kiu havas ion seriozan por prezenti, sciigu tion al ni. kiu volas subteni nian entreprenon, ĉu per donaco ĉu per prunto ĉu alimaniere, sciigu tion al ni.
diskonigu niajn eldonaĵojn!   diskonigu niajn eldonaĵojn!

Jam aperis:
1: La Evangelio laŭ Petro & La Morto de Jesuo kaj kio poste? apokrifa evangelio k eseo originala. 12 paĝ. 1,80 guld.
2: Tertuliano - Apologio (el la jaro 197 p.Kr) gravega latina verko el la frua eklezio. trad. Gerrit Berveling. 116 p. 9,90 guld.
3: Sin-konservo eseoj k predikoj pri kristanismo k nukleaj armiloj. 52 p. 6,30 guld.
4: Al Diogneto. apologieto el la komenco de la 2a jc. el la helena trad. Isai Sumber. 16 p. 1,80 guld.
ĉiuj ĉi tiuj en dua eldono
5: Kenneth Twinn - Unitariismo; skizo pri la kredoj historio k organizo de la religiuloj nomitaj Unitarianoj. la aŭtoro estas unitaria pastro. 24 p. 1,80 guld.
7: Gerrit Berveling - Dio/Kristanismo/Aliaj Religioj. studaĵo pri 'teologio de la religioj'. 36 p. 4,20 guld.
8: La Evangelio laŭ Maria Magdalena. prelego k traduko de la restantaj fragmentoj de apokrifa evangelio. grava pro la rolo de virinoj en la frua kristanismo. 12 p. 1,80 guld.
9: Jam Temp' Está!; la "Kairos-dokumento" de Sudafrikaj kristanoj. kontraŭ rasapartigo. 32 p. 4,20 guld.
10: Beatrijs: mezepoka romkatolika Maria-legendo. el la nederlanda. 24 p. 3 guld.
11: Isai Sumber - Kie oni trovas tion en la Korano? malgranda konkordanco. 32 p. 4,20 guld.
12: Tertuliano - Kuraĝigo por la Martiroj. por edifo de estontaj martiroj en Kartago, ĉ. 197 p.Kr. el la latina. 12 p. 1,80 guld.
13: Kantu al la Eternulo. kantaro de (ĉefe ĉeĥaj) kristanoj. trad. el diversaj lingvoj de Jiři Kořínek k.a. 44 p. 6 guld. 2a eld.
14: M.de Goeij - La virino en la Judismo. el la nederlanda. 48 p. 6 guld.
15: SEKELI POETAS; poemoj el la K.E.L.I.-rondo. komuna eldono de K.E.L.I. kaj VoKo. por honori la 100-jariĝon de Esperanto. 48 p. 6 guld.

krome prepariĝas verkoj
(i.a.) pri samseksemo k Kristanismo
pri arta fekundigo k moralo
prakristanaj kantoj en traduko
ekzegeza komentaro pri JONA
k.m.a.

eld. VoKo
Coornhertstraat 50
3132 GK VLAARDINGEN
NEDERLANDO





## KONSOLO POR LA HOMARO

"Benata estu la Dio kaj Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo, le Patro de kompatoj kaj Dio de ĉia konsolo ; kiu konsoladas nin en nia tuta aflikto, por ke ni povu konsoli tiujn, kiuj iel afliktiĝas, per la konsolo, per kiu ni mem estas konsolataj de Dio." (2 Kor 1:3-4)

En la hodiaŭa tempo - kiam minacas la mondon la nuklea ekstermo de la tuta homaro, kaj de ĉiu viva estaĵo en la plej malgranda formo, la homoj starigas demandon : Ĉu eterne ekzistos militoj, detruoj, suferoj, larmoj kaj fine la morto mem ? Ĉu venos iam la tempo de la eterna paco ?

Al ĉi tiu demando neniu povas respondi, krom la Sankta Biblio mem.

Post la Diluvo kaj post la konfuzo de la ununura lingvo en diversajn lingvojn, unu granda homa familio frakasiĝis en multajn naciojn, kaj de tiu ĉi tempo komenciĝis militoj inter nacioj, gentoj, kaj triboj.

De la supre menciita tempo ĝis la nuna, estis ĉirkaŭ 3000 militoj pro multaj kaŭzoj. Estis grandaj kaj malgrandaj militoj. Estis ankaŭ sangaj kaj sensangaj revolucioj. La pli fortaj nacioj subigadis malplifortajn naciojn. Subigitaj nacioj gvidadis liberigajn militojn.

Ni havis la unuan mondan militon, en kiu pereis 10 000 000 da homoj. Ni havis ankaŭ la duan mondan militon, en kiu mortis preskaŭ 50 milionoj, same soldatoj aŭ ne soldatoj. En ĉi tiu milito nur el la pola nacio pereis 6 000 000 da homoj, tio estas 20 %.

Nun minacas la mondon la tria monda milito en la signifo de la varmega milito. Sed nun oni jam travivas la ekonomian, komercan, diplomatian kaj akran ideologian militon, kiu komenciĝis de 1981 kaj ĝi jam apartenas al la tria monda milito[1], kiu estas laŭ la Apokalipso de Johano nomata kiel "la tria veo" (Apo 11:14), kaj laŭ la vizio de Elija kiel la "fajro" (1 Reĝ 19:12).

Ĉi tiu tempo - laŭ Johano el la Apokalipso - estas nomata en la hebrea lingvo HAR-MEGIDDON (la monto de la detruo) (Apo 16:16). Ĉi tiu milito inter du tendaroj en diversaj aferoj okazas pro Izraelo kaj laŭ Jeĥezkel 38 kaj 39 kaj Zeĥarja 12 kaj 14 kaj ankaŭ Jesaja 29:2-8. Ĝi finiĝos laŭlitere en Izraelo per rezulto priskribita en ĉi tiuj supere menciitaj profetaĵoj.

Ĉi tiu tempo laŭ la Biblio estas nomita kiel "la tago de la Sinjoro", la "tago de IHVH" (laŭ la MNT, Cef 1:14-18 ; 3:8 ; 1 Tes 5:2-3 kaj aliloke).

De kelkaj jaroj ni havis la konferencojn, Helsinki, Beograd, Madrid, dum kiuj estis kaj ĝis hodiaŭ estas priparolataj la sferoj de la Paco kaj Sekureco en Eŭropo. Sed bedaŭrinde iliaj rezultoj estas sensukcesaj. La Apostolo Paŭlo ne diras, ke ili kreos pacon, sed ke

> "dum oni diras : Paco kaj sendanĝereco, tiam subita detruo venas sur ilin, kiel naskodoloro al gravedulino, kaj ili tute ne forsaviĝos." (1 Tes 5:3)

Jesuo antaŭ 19 jarcentoj profetis :

> "La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos." (Mat 24:35).

Ĉu laŭvortaj ĉielo kaj tero forpasos ? La Biblio interpretiĝas per si mem. Ekzemple :

> "Generacio foriras kaj generacio venas, kaj la tero restas eterne." (Pre 1:4)
>
> "Ĉar tiele diras la Eternulo ; la kreinto de la ĉielo, Li estas Dio ; la farinto kaj estiginto de la tero, Li ĝin aranĝis ; Li kreis ĝin, ne por ke ĝi estu malplena ; Li faris ĝin, por ke ĝi estu loĝata." (Jes 45:18)

Ĉi tiuj du supraj tekstoj klarigas al ni, en kia signifo Jesuo parolis pri la forpaso de la ĉielo kaj de la tero. Li parolis pri la simbolaj ĉielo kaj tero. Petro en sia dua epistolo, 3:7, skribas ankaŭ pri la nunaj ĉielo kaj tero :

> "Sed la nuna ĉielo kaj la tero per la sama vorto estas destinitaj por fajro, rezervate ĝis la tago de juĝo kaj pereo de malpiuloj."

"La nuna ĉielo kaj la tero", la spiritaj aŭtoritatoj kaj la politiko-sociaj sistemoj de la mondo, ekzistas de la Diluvo ĝis la hodiaŭa tago.[2]

En Apokalipso ni ankaŭ legas pri la malnova ĉielo kaj la tero, kiuj estas forpasontaj (21:1), kaj pri la nova ĉielo kaj la nova tero, kiujn vidis en la vizio Johano sur la insulo Patmos. Estas konate, ke la libro Apokalipso estas plena de metaforaj signifoj.

Ankaŭ "fajro" havas metaforan signifon, eĉ kelkajn signifojn :

1. la vorto de la Eternulo estas kiel fajro (Jer 5:14),
2. la kolero de Dio estas kiel fajro (Read 32:22 ; Jer 21:12 ; Naĥ 1:6),
3. la malbonageco (Jer 9:13),
4. la homa spiro, spirito, la homa menso, ideo, konduto (Jes 33:11).
   La anarĥia ideo, konduto, detruos la nunan ĉielon kaj la teron, permesate de Dio, por ke ĝi agadu en ĉi tiu celo. La hebrea vorto RUAḤ havas ankaŭ signifon de menso, ideo, agordo, humoro, penso, konduto. Ekz-e *halaĥ 'aḥare ruḥo* konduti laŭ sia maniero, menso. *Labŝah 'oto ruaḥ* al ili imponegis la ideo. (laŭ hebrea-rusa vortaro)
   La anarĥia ideo, konduto agados kiel "fajro", faranta detruon al kaj en la socia, politika, religia sistemo, preparante vojon al la Dia regno, kiu konsistos el du fazoj, surĉiela kaj surtera. Ĉi tiu anarĥia ideo, konduto jam agas, kiel oni raportas el diversaj partoj de la mondo.
5. La lango, homa, estas kiel fajro. (Jes 30:27d ; Jak 3:6)
   Ĉu la homa lango ne faras kverelojn, kaj ne provokos al militoj ?





Se la tuta tero estos forbruligita, kiel estos kun homoj, nacioj ?

La respondon ni havas en la profetaĵo de Cefania, 3:8-9. La naŭa versiklo montras, ke kvankam la "nuna tero" estos forbruligita, tamen restos homoj, nacioj, malgraŭ ke ia parto de la homaro povas perei en ĉi tiu metafora fajro.

Jesuo en sia profetaĵo nomis ĝin la "grandan aflikton", tian, kia ne estis de la komenco de la mondo ĝis nun, nek iam estos (Mat 24:21).

Plue Jesuo diras, ke ĉi tiuj tagoj de la granda aflikto estos mallongigitaj pro la elektitoj (v. 22). Pri kiuj "elektitoj" Jesuo nia Sinjoro parolis ? Ĉi tiuj elektitoj estas fidelaj disĉiploj de Jesuo vivantaj en tiu tempo supre menciita[3].

Kiam ĉi tiuj elektitoj estos prenitaj en la ĉielon, tiam la granda aflikto atingos la plej altan punkton (2 Tes 1:6-7).

Ne ĉiuj, kiuj nomas sin kristanoj, estas ĉi tiuj elektitoj. Dio konas la Siajn[4].

Leganto de la revuo *Ĥaravgī*, greklingva eldonita en Usono, demandis la redaktoron : "Ĉu en la Sankta Skribo estas ia mencio pri la atoma bombo ?" La redaktoro respondis jene :

> "En la Sankta Skribo estas neniu mencio pri la atoma bombo, ĉar ĝi ne estis konata en tiu tempo, kiam la profetoj de Dio kaj la skribintoj de la Sankta Skribo vivis. Oni konis ion pri la atomo, sed ne pri la atoma bombo. Ĉi tiu eltrovaĵo apartenas al nia atoma epoko. Malgraŭ tio, la "Granda Profeto", Jesuo Kristo, en lia jam antaŭe menciita profetaĵo pri la granda aflikto (Mat 24:21-22) antaŭdiris, ke pro la elektitoj estos mallongigitaj tiuj tagoj", de ĉi tiu aflikto. "Se tiuj tagoj ne estus mallongigitaj, neniu karno estus savita." En ĉi tiu frazo eldirita de Jesuo estas kaŝita profetaĵa penso pri ia granda, potenca armilo, kiu kapablus en tre mallonga tempo ekstermi la tutan homaron kaj ne nur la homan vivon, sed ĉiun vivon sur nia tero." (mallongigita de *Ĥaragvē*, Noem.-Dekem. 1981.

Kaj ankaŭ en la Evangelio laŭ Luko, la Sinjoro antaŭdiris :

> "Homoj malfortiĝos de timo kaj de atendado de tio, kio venos sur la mondon."

Ni vivas akurate en ĉi tiuj tagoj. Ĉiuj gazetoj, radio, televido, skribas kaj diras pri ĉi tiu katastrofo minacanta nian mondon.

Sed la Sankta Biblio parolas pri la Dia enmiksiĝo en la homajn aferojn, kiu ne permesos, ke estu ekstermita "ĉiu karno" sur la tero. Ni legas en Psalmo 46:8 :

> "Iru, rigardu la aferojn de la Eternulo, kiu faris detruojn sur la tero, kiu ĉesigas militojn ĝis la fino de la tero, rompas pafarkon, rompas ponardegon, forbruligas veturilojn per fajro."

Ankaŭ en Jesaja 2:2-4 estas pri tio skribita :

> "Kaj Li juĝos inter la nacioj, kaj Li decidos pri multaj popoloj ; kaj ili forĝos el siaj glavoj plugilojn kaj el siaj lancoj rikoltilojn ; ne levos nacio glavon kontraŭ nacion, kaj oni ne plu lernos militon."

Hodiaŭ ĉiuj nacioj deziras pacon, sed oni vidas, ke mankas reciproka konfido inter nacioj.

Kiu estas kapabla fari eternan pacon ? Neniu registaro, eĉ ne la Papo faros la deziratan pacon. Nek la ekvilibro de la armiloj estas la dezirata paco. La ekvilibro de la armiloj, tio estas la "ekvilibro de la timego."

Do, kiu estas kapabla fari pacon ? Jen la respondo :

> "Kiu faras lumon kaj kreas mallumon, faras pacon kaj estigas malbonon ; Mi la Eternulo, faras ĉion ĉi tion." (Jes 45:7, vidu ankaŭ Ijob 34:29)

Malpiuloj ankaŭ deziras pacon, sed la Sankta Skribo skribas, ke por ili ne ekzistos paco. (Jes 48:22 ; 57:21)

Kiu estas malpiulo ? Respondon ni trovas en Psalmo 50:16-22. Mallonge dirite : Malpiulo estas tiu, kiu pretendas koni Dion ; sed per sia ago li malkonfesas Lin ; kiu parolas pri la Diaj leĝoj, sed malamas moralinstruon kaj ĵetas la Diajn vortojn malantaŭ sin (vidu ankaŭ Tito 1:16). Tia homo estas pli malbona ol ateisto, kiu ne konas Dion, sed havas bonan konsciencon (Rom 2:14-15). Kion Dio faros al malpiulo ? Li punos lin kaj Li metos ĉion antaŭ liajn okulojn ; Li disŝiros lin, ke li ne povos savi sin (Psa 50:21-22 ; Rom 1:18-32). Pekoj priskribitaj en Rom 1:18-32 estas farataj en kristanaj nacioj. Honto !

Ĉu ekzistas ia rifuĝejo en la tago de la Dia kolero ? Respondon ni havas en la profetaĵo de Cefania 2:3 :

> "Serĉu la Eternulon, ĉiuj humiluloj sur la tero, kiuj plenumas Liajn leĝojn ; serĉu veron, serĉu humilecon, por ke vi povu esti kaŝitaj en la tago de la kolero de la Eternulo."





La Sankta Skribo enhavas tian konsolon por la homaro :

> "Mi skuos ĉiujn popolojn ; kaj venos io ĉarma por ĉiuj nacioj..." (Ĥag 2:7)

"Io ĉarma por ĉiuj nacioj", tio estas la dezirata paco. Kaj ĉi tio estos en la regno de Kristo kaj Dio, pri kiu preĝas ĉiuj kristanoj, ankaŭ judoj, tra jam jarcentoj ĝis hodiaŭ : "Venu via regno !"

Ne timu, la terglobo ne estos detruita kun kun la homoj (Jes 45:18). Forpasos nur la malnova simbola "tero" kaj la malnova simbola "ĉielo", en kiuj regis maljusteco, krimeco, doloroj, malsanoj kaj morto. Sed ni ĝoju, ke Dio prepare faras ĉion novan kaj kreas novan ĉielon (simbolan), la aŭtoritaton de Kristo kaj de Lia Eklezio nevidebla per la okuloj de la homoj sed eksentebla en iliaj vivoj. Kristo kaj Liaj fidelaj membroj de la surĉiela regado estos "kiel vento", nevideblaj (Joh 3:5-8). Kaj ankaŭ kreas la novan teron, la novan socian ordon direktita de la sanktuloj de la malnovtestamentaj tempoj, kiuj ricevos "la pli bonan releviĝon" sur la tero kiel la perfektaj homoj (Apo 21:1-5 ; 2 Pet 3:7-13 ; Psa 45: 16 ; Heb 11:35). Ĉi tiuj "princoj" estos videblaj per homaj okuloj, kaj ili estos surtera fazo de la Dia Regno.

> "Li proklamos pacon al la nacioj, kaj lia regado estos de maro ĝis maro, de la Rivero ĝis la finoj de la tero."

Pri tia stato kantis Diaj anĝeloj ĉe la naskiĝo de Jesuo (Zeĥ 9: 10c ; Lk 2:13-14 ; Jes 9:6-7).

> "Venu Via Regno !"

Karol Baklarz, Pollando

NOTOJ

1. N.D.L.R. : La artikolo estis verkita antaŭ la diversaj ĵusaj pac-akordoj.
2. En la sama signifo Moseo parolis en la libro Readmono, 32:1 :
   "Atentu, ĉielo, kaj mi parolos ; kaj aŭdu la tero la vortojn de mia buŝo."
   Kaj en 31:30 estas skribita :
   "Kaj Moseo eldiris antaŭ la oreloj de la tuta komunumo de Izrael la vortojn de ĉi tiu kanto ĝis la fino."
   El ĉi tiu versiklo oni povas konkludi, ke Moseo metafore parolis al la pastroj kaj levidoj kiel al "la ĉielo" kaj al la presbiteroj kaj al la tuta socio de Izraelo kiel al "la tero."
3. Kol 3:12 ; 2 Tim 2:10 ; Tito 1:1 ; 1 Pet 1:2 ; 2:9 ; Apo 17:14.
4. 2 Tim 2:19b ; Mat 7:21 ; Apo 14:1-5 ; 17:14.

Karol BAKLARZ, polo, tradukisto el la angla por la pola revuo *Świt* (Tagiĝo) de la Asocio de Bibliaj Studantoj, jam kunlaboris en *Evangeliaj Kajeroj*.

Por la venonta numero mi esperis du artikolojn, de du homoj, pri kiuj multaj havis plej grandajn esperojn por la kristana Esperanto-movado.

Sed ŝoko atingis min, kiam mi eklernis pri unu kaj poste pri la alia, ke ili ambaŭ mortis.

La Eternulo donis ilin. La Eternulo prenis ilin. Sed ne estas tre facile ĉiam beni la nomon de la Eternulo en tiaj okazoj.

Ni preĝu por la amikoj kaj familianoj de

ZHAO ZHILIAN

kaj de

GUIDO HOLZ.





# REALIĜO DE LA REGNO

En la Biblio la evangeliistoj donas multajn ekzemplojn per kio oni povas kompari la Regnon de Dio.
Ekzemple :

> "Ĝi estas simila al sinapa semeto, kiun viro prenis kaj ĵetis en sian ĝardenon ; kaj ĝi kreskis kaj fariĝis arbo, kaj la birdoj de la ĉielo loĝis en ĝiaj branĉoj." (Lk 13: 18-19), aŭ
> "Ĝi estas simila al fermentaĵo, kiun virino prenis kaj kaŝis en tri mezurojn da faruno, ĝis la tuto fermentis." (Lk 13:21)

La samaj evangeliistoj nomas la Regnon de Dio : la Regno de la Ĉielo kaj donas similajn komparojn.
Ekzemple : Ĝi similas al trezoro, kaŝita en kampo kaj la viro, kiu ĝin trovis, vendis ĉion, kion li posedas, por aĉeti la kampon. Same faris la komercisto, kiu trovis multvaloran perlon. Do, ĝi penetras ĉion : la koron, la senton, la menson, la tutan vivon.

Plej impresas min ĉiam la diro, ke la Regno de Dio estas meze inter ni !

> "Kaj kiam la Fariseoj demandis al li (Jesuo) : Kiam venos la Regno de Dio ? li respondis al ili, dirante : La Regno de Dio ne venas kun observado kaj oni ne diros : Jen ĉi tie, aŭ : Jen tie ! ĉar jen la Regno de Dio estas inter vi." (Lk 17:20-21)

Tiuj diroj pri la Regno de Dio estas vere la centro de lia predikado. Ĉio rilatas al tio. Niaj agoj, niaj pensoj, nia kredo, nia fido, nia konsolo en ĉi tiu ofte malfacila vivo.

Sed kial ni ofte aŭ eĉ tute ne povas vidi ĝin ? Ĉu ne ĉiuj ŝajne gravaj aferoj tute kaŝas ĝin ? Faras la Regnon de Dio nevidebla ? Ĉu estas niaj ofte egoistaj agoj la kaŭzo ? Ĉu ni trovas nin mem pli valoraj ol tiu eldiro de Jesuo ?

Se ni rigardas ĉirkaŭ ni kaj vidas ĉi tiun malfeliĉan mondon kun la miliardoj da homoj, kiuj vivas sub la minimuma limo de ekzisto, sub perforto kaj torturado kaj subpremo, ni ne povas kredi ke la vorto de Jesuo estas vera. Kaj tiam ni ofte riproĉas al Dio, kial Li toleras tion. Kial Li ne intervenas kaj savas nin. Ŝajnas, ke Li restas indiferenta pri la sorto de la homoj. Sed ĉu Dio havas la kulpon kiam ni tiel malbone regas en ĉi tiu mondo kaj tiel malbone traktas niajn kunhomojn ?

Dio kreis la homon kun propra respondeco pri lia aù ŝia vivo, la homo plene respondecas por siaj bonaj kaj malbonaj agoj, kaj Dio ne instruis nin superi unu la alian, per potenca forto malhonori aliajn, murdi ilin. Li instruis nin ami kaj respekti kaj atenti unu la alian, prizorgi reciproke nin.

Li donis dek vivregulojn sur la monto Sinaj al Sia popolo Izrael, kiuj ankaù koncernas nian vivon sur ĉi tiu tero. Sed kie aùdiĝas ankoraù tiu leĝo en la Diservoj, aù kiu komprenas en ĉi tiu moderna mondo ankoraù ĝian signifon pro la antikvaj esprimoj ? Diversaj teologoj klopodis traduki en pli modernaj konceptoj tiujn dek vortojn aù ordonojn, kiel ni antaùe nomis ilin. En la lasta tempo la eklezioj kunfrontiĝas kun la bonega traduko, fare, el la origina hebrea lingvo, de la judo Max Arab, kaj estas kvazaù reviviĝas tiuj instruoj de Dio ! Kie ili estas legataj en Diservoj, la aùskultantoj fariĝas ege impresitaj.

Jen la vortoj :

1. La Eternulo diras : Mi estas la Dio, kiu vin liberigis.
2. Per falsa bildo de mi, vi ne povas pli alproksimigi min.
   Neniam vi povas fiksi min en aferoj, kiujn vi elpensis.
   Figuri Min vi ne povas.
   Ne imagu ke vi povas Min teni supren en la ĉielo aù malsupren sur la tero, aù en la akvo sub la tero.
   Per via imagpovo vi malgrandigas homojn.
   Kiu humiligas homon, ne grandigas Dion.
3. Ne falsigu la Nomon de via Dio lasante la kunhomon senhelpa.
   Ekskluzivu Dion kiam vi estas okupata por propra profito.
   Blasfemado estas impliki Dion ĉe aĉaj aferoj.
4. Ses tagojn de la semajno vi kune laboras kun la Sinjoro, via Dio, por la liberigo de Lia kreitaĵo. Pripensu : Je la sepa tago ni festas kune feston. Vi estas liberigita homido. Vi rajtas ripozi kaj senzorge vi rajtas esti - kune kun la Sinjoro, via Dio - kiam finfine ĉio kaj ĉiu estos valora estaĵo.
5. Pliaĝuloj rakontas pri sia vivo kun la Sinjoro Dio.
   Aùdu hodiaù kiel Dio estis hieraù kaj estos morgaù...
6. Al neniu vi rajtas fari la vivon neebla.
   Ĉiu homo havas la rajton je propra ekzisto.
   Kreu spacon por via kunhomo.
7. Lojala vi estas kiam vi havas respekton por homoj kaj ilia maniero de vivo. Fidela vi estas por homoj, kiuj volas dividi sian vivon kun vi.
8. Vi ŝtelas se vi forprenas ion de alia.
   Vi ŝtelas se vi rifuzas doni al kunhomo tion, kion li bezonas.
9. Vi forte dediĉu vin por ies bona reputacio.
   La kruda vero povas detrui homon. Ĝi estas falsa atesto.
   Honesteco neniam akordiĝas kun senameco.
10. Ne atencu la vivo-medion de alia. Estu zorgoplena por ĉio kio vivas. Ĉion, kio estas vivofeliĉo - por via kunhomo kaj por vi mem - vi dorlotu kiel Dia-donacon.





La instruoj de Dio ne estas ordonoj, sed or-donacoj, por helpi nin vivi laù Lia volo kaj en Lia Nomo.

Ekzistas kvin reguloj, kiuj instigas nin preni tiun riskon kun Dio kaj la ceteraj kvin promesas al ni : la sperton de la estonteco kun Dio, sen sango-fluado, sen malfideleco, sen ŝtelado, sen mensogoj, sen avideco kaj envio. Kion ni volas pli ? Se ni klopodas plenumi ilin, kaj Jesuo donis al ni sian Sanktan Spiriton por helpi nin, tiam leviĝas parto de la vuala kurteno kaj ni vidas ke la Regno de Dio vere estas inter ni. Ni eĉ rekonas Kriston, kiel li manifestiĝas en iu aù tiu, kiu klopodas vivi, same kiel Jesuo, favore al la homoj, por ke ankaù por ili venu la justeco, la samrajteco, la libereco, la feliĉo kaj la espero.

Ĉu ni ricevis inviton por provi mem, kun Li, realigi ke la Regno de Dio videbliĝas ? Aù ĉu ni devas lasi ĉion al la iniciato de Dio mem ? Mi kredas ke ne. Dio ne ŝatas ke Liaj partneroj sidas trankvile kun la manoj en la sino kaj faras nenion ! Kiu agas por bonigo de la situacio kaj la sorto de la proksimuloj, tiun Li helpas, kaj benas kaj inspiras. Dio neniam volas esti sola kaj sole laboranta, Li ĉiam invitas nin kiel Liajn partnerojn kaj aliancanojn por kunlabori kun Li.

Kompreneble la fina rivelo okazas per la Diaj saĝeco kaj amo, Li ja promesis al ni novan ĉielon kaj novan teron, en kiuj loĝas justeco. Sed tio ne signifas ke ni nur atendadu tion, sen movi nin.

Justeco ne povas ekzisti sen paco kaj paco ne povas ekzisti kiam ni detruas nian medion, la tutan ekologion. Tial nun ĉie aùdiĝas la Alvoko al ni kredantoj kaj al ĉiuj homoj por eklabori per ĉiuj fortoj kaj rimedoj en saĝeco kaj amo, sed urĝe por ke venu paco kaj justeco kaj por ke ni ĉiuj kunlaboru por la resanigado de la jam detruata kreitaĵo. Ni ne preteriru tiun necesegan laboron, malgraù ke Dio per la profeto Jesaja diras :

> "Mi kreos novan ĉielon kaj novan teron ; kaj la antaùaĵo ne estos rememorigata." (Jes 65:17)

Tamen ni nun, helpe de Dio, evitu ke nia hodiaùa mondo detruiĝos !

Tiu Regno de Dio estas unue promesita al la malriĉuloj ! Por riĉuloj estas tre malfacile eniri en ĝin. Sed infanoj, malgrandigitoj (de potenculoj), invalidoj kaj mizeruloj estas ege bonvenaj.

La laboro pri Justeco kaj Paco kaj *Konservo* de la Kreitaĵo tre koncernas la Regnon de Dio. Ĝi estas donita al ni en la dek vivreguloj de Dio. Ni ne rajtas rifuzi tiun taskon. Ĝi gvidas al tutmonda koncilia proceso. Ĉiu povas partopreni en tio.

Dum la konferenco de teologoj en Budapest (Budapeŝto) laborgrupo redaktis 12 "ordonojn" por la koncilia proceso.

1. Kontraŭstaru ĉiun delogon por nomi justecon pli grava ol paco aŭ inverse ; ligu ilin kune.
2. Komencu ĉe la spertoj de homoj, kiujn ili havas kun justeco, paco kaj **konservo** de la kreitaĵo en ilia propra ĉirkaŭejo.
   Aŭskultu precipe al la voĉoj de tiuj, kiuj estas subpremataj kaj suferantaj, kaj de tiuj, kiuj batalas por vivo en ĝia plena riĉeco.
3. Uzu la spertojn de tiuj grupoj kaj movadoj, kiuj aktivas jam sur la terenoj de justeco, paco kaj **konservo** de la kreitaĵo kaj partoprenigu ilin jam ek de la komenco.
4. Serĉu vojojn, kiujn ni vere povas suriri.
   Estu ĉiam konkreta kaj praktika.
5. Ne lasu forpeli la demandojn pri justeco, paco kaj **konservo** de la kreitaĵo, per la demando, kio nun fakte estas tiu koncilia proceso.
6. La vorton "ligo" oni facile povas misuzi. Estu singarda uzi ĝin. Ligo, alianco, referencas al reciproka, plena devigo, kiun oni povas esprimi per liturgio.
7. La Eklezio estas egale loka kaj monda. Lokaj kunvenoj ne estas malpli gravaj ol naciaj, eŭropaj aŭ mondvastaj kunvenoj.
8. Uzu la Biblion zorgoplene. Ni urĝe bezonas novan freŝan pririgardon de la Biblio.
9. Uzu tiujn artikolojn kaj librojn, kiuj montras koheron inter lokaj, regionaj kaj mondvastaj problemoj.
10. Justeco, paco kaj **konservo** de la kreitaĵo egale estas aferoj de la kredo kaj de saĝeco, ĉar ili estas temoj de graveco por la tuta homaro. Tial parto de la proceso estas ke ekestos dialogo kun homoj de aliaj kredoj kaj ideologioj.
11. Ne timu konfliktojn en la koncilia proceso.
    Ni ne atingas unuecon sen konflikto.
12. La koncilia proceso ekzistas el preĝo kaj agado, en konvertiĝo kaj pentofarado kaj komenciĝas vin mem.

Ĉu Dio atendos ĝis ĉiuj kredantoj faras unu grandan unuecon ? Se tio dependas de niaj (mal)klopodoj, tiam la Regno de Dio neniam realiĝos. Sed feliĉe ankaŭ je tiu tereno la kredantoj konsideras la eblecojn.

Pli kaj pli venas aperturetoj. En Nederlando nun du Rom-katolikaj teologoj malkovris, ke ĉar en nia lando kaj ankaŭ en ĝia apudeco ekzistas reciproka rekono de la Bapto-sakramento, ankaŭ malfermiĝas tiam la ebleco por festi kune la Manĝon de la Sinjoro. Tio devos esti la logika sekvo de tiu agnosko de niaj reciprokaj Bapto-ceremonioj. Ĉar en la Bapto-liturgio kaj en la Eŭkaristia preĝo esprimiĝas la sama kredokonfeso, nome ke ni kredas en la Triunuo, en la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito. Vere ĝojiga konkludo. Nun sekvu la praktiko !

Ĉu ni vidas tiun ĉeeston de la Triunuo ? Jes, ni daŭre spertas de Dio liajn indulgon, pardonemon, gracon, promesojn, amon, apogon, ĉeeston en niaj vivoj.





Ni spertas de Jesuo lian instruon, kiu tute inversas ĉiujn valorojn, kiujn ni elpensis. Vere, liaj vivreguloj ege malsamas al tiuj, kiujn ni manipulas en ĉi tiu mondo. Jesuo aldonas ke la plej gravaj vivreguloj estas ke ni amu nian Dion kaj nian proksimulon kiel nin mem. Se ni ne amas nian proksimulon, tiam nia konfeso ke ni amas Dion estas malvera. Johano skribas en sia letero :

> "Kiu ne amas, tiu restas en morto. Ĉiu, kiu malamas sian fraton, estas hommortiganto... Se iu havas mondan posedaĵon kaj vidas sian fraton havantan bezonon kaj fermas sian kompaton kontraŭ li, kiel la amo de Dio restas en li... Ni amu, ne laŭ vorto nek laŭ lango, sed laŭ faro kaj vero."
> (1 Joh 3:14-15,17,18)

Ni spertas la laboron de la Sankta Spirito en tio, ke ĝi gvidas nin, instigas nin kaj inspiras nin, kaj malfermas perspektivojn kaj eblecojn.

Krome, la releviĝo de Jesuo donas al ni vivon en abundeco. Tiu vivo subtenas la homojn en ege malfacilaj viv-cirkonstancoj, instigas kaj fortigas ili persisti per kredo kaj amo.

Tre multaj kredantoj spertas la ĉeeston de la Triunuo en la liturgio de la Sankta Manĝo. Cetere profunda liturgio donas ĝojon kaj liberecon al la homoj ; ili povas sin liberigi de zorgoj kaj jugoj kaj pro tio ili povas elkore laŭdi kaj glori sian Dion, Savanton kaj Sinjoron.

Ĉio inkludas ke ni forlasu niajn idolojn kaj forlogilojn, kiuj ajn ili estas kaj kiel ajn ili aspektas kaj ke ni ree konvertiĝu al Dio. Daŭre ni devas returni de niaj mem-elektitaj vojoj kaj reiri sur la savigan vojon laŭ la voj-montriloj de Dio al la estonteco de Li.

Jelly Koopmans-Schotanus, Nederlando

Jelly KOOPMANS-SCHOTANUS, 69-jara, nederlandanino, edzino de Wim KOOPMANS, konata porpaca laboranto kaj esperantisto. Ŝi estas laika reformita pastoro. Ŝi verkis *Preĝo por ĉiu tago*, tradukita germanen *Bete mit mir*.

# Dominikus
## Leben und Werk



# Pri Sankta Dominiko

Helga Joerger OP / Franz-Georg Rössler

Armin Gmeiner Verlag



## SABATO KAJ REGNO DE DIO

La Sabato (hebree ŜABAT) estas grava festo en Izraelo. Ĝi estas propra ĉar :

1-e : ĝi estas la sola, kiu estas en la Dekalogo,
2-e : ĝi estas la sola, kiu estas semajna, ne jara kiel la aliaj.

Malfacile estas koni la devenon de Sabato. Eble (sed ne certe) ekzistas nedirekta rilato kun malfeliĉaj tagoj en Mezopotamio. Oni estimas, ke Sabato estis adoptita de Izraelo post la reveno de la Babiblona ekzilo, por esti, kun la cirkumcido, juda specifeco kontraŭ paganismo.

Sed oni povas ankaŭ trovi argumentojn, kiuj montras, ke Sabato havas devenon pli malnovan.

Dum la novtestamenta periodo, Sabato estis tre grava. Pri ĝi kreskis rabina kazuistiko, por ke tiu festo estu respektata kaj fidele solenata.

Laŭ la opinio de multe da kristanoj, Jesuo nuligis Sabaton. Oni solenas la dimanĉon kiel tagon de la Sinjoro. La Patroj diras, ke Sabato estas la sola ordono, kiun la kristanoj ne povas observi kiel la judoj : Aŭgustinus (S-a Aŭgusteno) aŭ Barhebraeus, siriaka patro kiu skribis :

> "Kristo ne nuligis la dek ordonojn, krom Sabaton, kaj verdire, li ne mem nuligis Sabaton, sed li sanktigis ankaŭ ĉiujn tagojn kiel ĝi."

Ofte la kristanaj teologoj estas ĝenitaj de Sabato : la malnovan interligon nuligas la nova. Dimanĉo anstataŭigas Sabaton. Sed ĉu oni povas forĵeti unu punkton de la Dekalogo ?

Estas do grave precizigi la spiritan signifon de Sabato. Por tio estas necese kompreni la parolojn de Jesuo pri ĝi.

La konata parolo de Jesuo

> "La Sabato estiĝis por la homo, kaj ne la homo por la Sabato." (Mk 2:27)

ne signifas, ke Jesuo nuligas Sabaton, sed ke li volas redoni al ĝi ĝian veran sencon. Kiam Jesuo resanigas malsanulon dum Sabato, li ne neas ĝin, sed kontraŭe li redonas al ĝi ĝian gravecon. Por Dio, Sabato estas la tago, aŭ neniam, resanigi malsanulon ; tio estas redoni al homo la plenumon de lia estaĵo. Sanigo ne estas laboro sed re-kreado. La plezuro de Dio estas vidi homon resanigita dum Sabato ; Dio plenumas sian kreadon. Sabato estas signo, anonco de la savo.

Sabato estas la plezuro, kiun Dio havis post kiam Li finis krei :

> "Dio finis en la sepa tago sian laboron, kiun Li faris kaj Li ripozis en la sepa tago de la tuta laboro, kiun Li faris." (Gen 2:2)

Por kio Dio kreis ? Neniu tion konas, ĉar neniu homo estas anstataŭ Dio. Neniun kialon donas Dio : Li kreas grace.

La ordono de Sabato, kiun Dio donas al Sia popolo, estas pedagogia. En la deksesa ĉapitro de la libro Eliro, la vorto Sabato aperas unuafoje (laŭ la nuna teksto). Ĉi tiu ĉapitro rakontas al ni la historion pri la manao : ĉiutage la popolo devas preni la manaon por nutriĝi, sed la sepan ĝi devas fari nenion, preni nenion, ĉar ĝi ricevas nutraĵon de Dio. La homa vivo ne dependas de lia aktiveco, sed nur de la Dia graco.

La Sabata rito estas anonco de la pravigo per la graco. Sabato estas en nia laboro, limo de nia agemeco. Ni ne estas savita per niaj meritoj, sed per graco :

> "Ĉar per graco vi saviĝis per fido ; ne per vi mem : ĝi estas dono de Dio ; ne el faroj, por ke neniu fanfaronu." (Efe 2:8-9)

Jesuo Kristo venis por anonci la Regnon de Dio. Ĉi tiu regno estas samfoje veninta kaj venonta. Veninta en Kristo, venonta en la fino de la tempoj. Sabato, kiel juda festo anoncis Kriston, sed ankaŭ la plenumon de la Regno. Sabato ne estas nuligita sed la Regno estos kiel eterna Sabato. Ĝi instruas al la kredanto, ke li povas fidi nur la gracon, donacon de Dio : Sabate la homo konfidas sian tutan vivon al Dio. Ĝi nuligas angoron serĉi nutraĵon, angoron kiun la homo pensas forpeli per sia laboro, aŭ sia aktiveco. Sed aktiveco fuŝas la gracon. La pravigo per la graco, kiu estas la plej grava mesaĝo de la Reformacio, havas la saman celon : doni al la homo la certecon de lia savo, savo venanta ne de li mem sed de Dio. La homo ne devas fidi al si sed al Dio sola.

En Kristo, Sabato ricevas sian plenan signifon. Sed kiel vivi Sabaton ? La kristano tro pensas, ke Sabato estas nur juda rito. Sed li povas ankaŭ vivi Sabaton kiel spirita asketismo. Estas negativa aspekto : rifuzi aktivecon, limigi laboron, por si mem sed ankaŭ por la proksimulo. Ofte ni postulas tro de ni mem kaj de la aliaj, kaj la kristana aktiveco similas al fuĝo antaŭen.

Estas necese retrovi spiritan vivon : la preĝo kaj la Dia parolo. La juda Sabato iĝas la Sinjora tago, kies centro estas la Sankta Manĝo. Per ĝi la kristano konstruas sian tempon, lernas tion, kio estas la plej grava afero en lia vivo. Per Sabato, en la Sankta Manĝo manifestiĝas jam la venonta Regno de Dio.





Homa Sabato antaŭprezentas Dian Sabaton, tago kiam la Reĝo ripozas por kontempli Siajn verkojn kaj Sian regnon.

Alain Georges Martin, Francujo

Alain Georges MARTIN (1933), franco, pastoro de la Franca Reformita Eklezio, D-ro pri teologio, edzo kaj patro de 3 infanoj, prez. de la franca sekcio de KELI.

Kultura Centro Esperantista
Centre culturel espérantiste
Esperanto-Kulturzentrum
Centro culturale esperantista
Center culturel esperantist
Esperanto Cultural Centre

Postiers 27
Poŝtfako 779
CH-2301 La Chaux-de-Fonds
Svislando
Telefono 039 26 74 07
Poŝtkonto 23-2921

KCE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

Kultura Centro Esperantista, Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

**INTERNACIA FERIA ALTLERNEJO de KULTURA CENTRO ESPERANTISTA**

**3-a Kristana Kultur-Semajno Esperantista 1989 oktobro 02 - 06 en La Chaux-de-Fonds, Svislando**

KCE donas al ni la eblon travivi agrablan semajnon kun amikoj en kristana rondo. Ni celas konstrui ponton inter junularo kaj la ĝisnunaj partoprenantoj Per muziko kaj kantado, per ekskursoj kaj diskutoj ni spertos trajtojn de kristana kulturo. Ni invitas ĉiujn interesiĝantojn. Studentoj ĝis 25 jaroj ĝuos forte reduktitajn prezojn.

**Programeroj de la 3-a Kristana Kultur-Semajno Esperantista:**

Ĉefaj programeroj de la semajno estos:
- Kantado kun Adolf Burkhardt en praktiko kaj teorio. Multaj novaj religiaj kantoj el la tuta mondo estas tradukitaj de li. Ni utiligu ilin en ĝoja rondo.
- Ekskursojn al eklezie rimarkindaj ejoj preparos diakono Marilu Münger.
- Theotima Rotthaus OSB: Bibliaj demandoj; Bibliaj rondoj.
- Bernhard Eichkorn: Komputila laboro en servo de Kristana Fakvortaro utilige de Per-Komputora Termino-Kolekto de R. Eichholz, Kanado
- Gerrit Berveling (Kristanaj eldonoj, prelego), kaj aliaj.
- Aktualaj informoj. Variaj Diservoj. Meditejo Kapelo Max Josef Metzger kreskas

Gvidado kaj informoj programaj: Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, D-7730 VS-Villingen. Lokaj rilatoj ekleziaj kaj turismaj: Marilu Münger, College 14, CH-2114 Fleurier. Aliaj informoj kaj aliĝoj rekte al KCE.

Armin Gmeiner VERLAG

Armin Gmeiner Verlag, Kolpingstr. 8, 7790 Meßkirch,

*Esperantlingvaj eldonaĵoj*

**2a Vatikana Koncilio: Dekreto pri la ekumenismo.**

*Eldonanto: Bernhard Eichkorn.*
*Tradukisto: D-ro Guido Holz.*
*1985, krampite, DIN A 5,*
ISBN 3-926633-07-7,
*Mendo-N-ro.* 2207, 5.-- DM.

**Pri la homa laboro.**

*Johannes Paul 2-a,*
*Tradukis el la pola:*
*Prof. Tyburcjusz Tyblewski,*
*En sia multelegata enciklikio la Papo aplikas la eklezian instruon al la nuntempa vivo substrekante la homan dignon de la laboro.*
*1985, 90 paĝoj, broŝura, 21x14,8 cm,*
ISBN 3-926633-02-6,
*Mendo-N-ro.* 2302, 15.-- DM.

**Max Josef Metzger, sacerdoto, matiro por paco, pioniro de ekumenismo.**

*Prelego de Walter Mudrak, Wien, legita en Meitingen okaze de 6-a Ekumena Esperanto-Kongreso Augsburg 1985.*
*Kun aldonoj.*
*Editoro: Bernhard Eichkorn omage al 100-jarigo de M.J. Metzger, naskita 1987.*
*1987, 32 paĝoj, krampite, DIN A 5,*
ISBN 3-926633-09-3,
*Mendo-N-ro.* 2309, 5.-- DM.

**Kasedo kun prelego de d-ro Werner Bormann: La Evoluo de Esperanto kaj la Akademio**

*Prelego okaze de la seminario de Germana Esperanto-Instituto en Konstanz 30. September 1984.*
*1985, C 60,*
ISBN 3-926633-05-0,
*Mendo-N-ro.* 2801, 7.-- DM.

**La Evoluo de Esperanto kaj la Akademio.**

*Publikaĵoj n-ro 7 de Germana Instituto.*
*1985, 16 paĝoj, krampite, DIN A 5,*
ISBN 3-926633-05-0,
*Mendo-N-ro.* 2805, 3.-- DM.

**Kompletorio de la semajno.**

*Po unu Kompletorio de 7 semajntagoj laŭ la Breviero.*
*Kompilis kaj tradukis*
*Bernhard Eichkorn.*
*1987, 36 paĝoj, krampita, DIN A 5,*
ISBN 3-926633-10-7,
*Mendo-N-ro.* 2210, 5.-- DM.

Armin Gmeiner VERLAG



## LA VENO DE LA DOMOMASTRO

Marko 13:35 : "Vi do viglu ; ĉar vi ne scias, kiam venos la domomastro, ĉu vespere, ĉu noktomeze, ĉu ĉe la kokokrio, ĉu frumatene."

Ni ne scias la horon de la reveno de Kristo, kaj kompreneble ni supozus, ke la parto de la tago estos malsama en diversaj landoj de la mondo. Ĉi tiu reveno rilatas al la amasigo de la Eklezio, ne al la posta reveno kun la Eklezio sur la monton en la lando de la judoj menciita en Zeĥarja 14. En Zeĥarja ĉio rilatas al la intervenо de la Mesio dum granda batalo kaj la konvertiĝo de Izrael. Antaŭe ni atendas la amasigon de la Eklezio al Kristo en la aeron. Ni supozus ke estus plej bone se ĉi tio okazus dum la vespero, kiam familioj estas kune je la fino de la tago. Tamen, Jesuo ne garantias ĉi tion, kaj aludas al aliaj partoj de la tago...

Ĉe la kokokrio, ĉi tio estus la tagiĝo ; la familio estus kune, sed ankoraŭ dormanta, ĉi tio estis la tria gardostaro de la nokto inter la judoj. Mi rimarkis ke D-ro Martin Luther laŭ la reviziita traduko de la Biblio en la germana lingvo uzas *Hahnenschrei* kaj ne *Hahnenruf*. La unua vorto emfazas la kriĉon de interrompo, dum la alia estus la krio por alfronti la novan tagon. Kiam Jesuo alvenos por amasigi sian Eklezion, estos tiuj kiuj restos, kaj por ili estos teruro. Por la Eklezio estos la komenco de mirinda tago kun Kristo, kiu neniam ĉesos, ĉar ili estos ĉiam kun la Sinjoro de tiu horo. Eĉ dum la plej malluma parto de la nokto, tuj antaŭ la tagiĝo, ni devas esti pretaj. En gazeto *Botschafter des kommenden Königs* (Ambasadoro de la venonta reĝo), unua de februaro 1967, mi trovis recenzon pri la libro verkita de Billy Graham, *World aflame* (Fajranta mondo). Fine Hermann Leitz verkas rilate al la lastaj tagoj kaj signoj de la reveno jene :

> "Ofte mi pensas vespere kiam mi enlitiĝas, ke Kristo povus reveni antaŭ ol mi vekiĝus. Kiam mi leviĝas kaj rigardas la ruĝon de la mateno, kelkfoje mi pensas, ĉi tio povus esti la tago, kiam li venos !"

Ĉi tiuj estas la vortoj de D-ro Graham, kaj Hermann Leitz indikas poste :

> "Ke ni, la legantoj kaj ĉiuj kredantaj kristanoj, ankaŭ tiamaniere pensu kaj vespere kaj matene ! La koko kriis antaŭ ol Petro vidis Jesuon - ĉu ni estos hontemaj kiam li aperos ?"

Ankaŭ Hermann Leitz emfazas pri la mondskala vojaĝado de D-ro

Graham, ke li estas sufiĉe lerta povi tiamaniere verki libron pri la tuta mondo...

## Noktomeze

Estas la tempo kiam la familio dormas. Kutime oni enlitiĝas antaŭe, kaj ĉi tio estas la horo meze de la mallumo ; la sunsubiro okazis je la 18-a (la antikva dekdua horo) kaj la sunleviĝo okazis je la 6-a (la antikva unua horo). Efektive, la dekdua horo estis de la 17-a ĝis la 18-a horoj, kaj la unua horo estis de la 6-a ĝis la 7-a horoj. Tiamaniere la noktomezo estis la mezo de la mallumo. En S. Mateo 25 ni legas pri la alveno de la fianĉo. Noktomeze. Kutime oni pensas pri la mallumo kiel simbolo de malbono, kaj la reveno de Kristo je tia horo estus granda venko pri la lumo. En la skribrulaĵo de la Morta Maro "La milito de la filoj de lumo kontraŭ la filoj de mallumo", ĉi tiu simbolo estas uzita. Kvankam la aludo povas esti historia, ekz-e de la tempo de la Makabeoj aŭ la vojaĝo de Izrael en la dezerto. Aliflanke estas ankaŭ emfazo pri la komunumo de la fintempo (vidu la enkondukon en la libro "La Qumranaj esenoj", verkita de Prof. D-roj Johan Maier kaj Kurt Schubert, paĝo 245). En la skribrulaĵo I, 6-7 troviĝas "kaj neniu savo estas por (ĉiuj filoj de) mallumo." Ĉi tio estas deca rilate al la reveno de Kristo, kiam la Eklezio estos prenata kaj la malpiuloj lasitaj por suferi dum la granda aflikto. En "Ĉiutaga vivado en Palestino", verkita de H. Daniel-Rops, mi trovis jene :

> "Estis kvar gardperiodoj ... la dua estis la malhela noktomeza gardperiodo, malprecize deziranta eĉ sub la luno kaj la steloj, kiam, kiel Psalmo 129, la *De profundis* (de la profundo) diras, la gardistoj atendis la tagon."

## Frumatene

Ĉi tiu periodo estas la lasta gardperiodo ; vespere estas la unua, noktomeze la dua, ĉe la kokokrio la tria, kaj frumatene la kvara. La citita libro indikas jene :

> " La kvara estis la aŭrora gardperiodo, kiam fine mirindaj koloroj aperis horizonte laŭgrade, kaj homoj kaj bestoj vekiĝis, kaj vivado rekomenciĝis sur la tero."

Mi kutime uzas ĉi tiun periodon por preĝi kaj prepari mesaĝojn. Ofte estas ankoraŭ malluma kiam mi leviĝas, kaj unue mi devas vesti min, lavi min kaj razi min. Ĉi tio okazas je proksimume la 5-a 15 min. Do estas laŭgrada submetado al Dio por nova tago. Kompreneble mi ofte pensas ke eble la Sinjoro Jesuo revenos dum la nova tago naskiĝas. Aliaj alvenas, kiel la leterportisto kaj la laktisto. Mi memoras la kolegian emfazon, ke oni devas komenci studadon frue, kaj la Sinjoron, lin mem, kiu frue troviĝis sur monto. Jes mi havas





la komforton de mia fajro kaj de la elektra lumo, sed kiel li, mi devas atendi kaj preĝi. Eble iuj el miaj legantoj devus sperti la benon kun mi. Se jes, ni povus meti zonon ĉirkaŭ la mondo ! Multaj pensas nur frumatene pri personaj, familiaj kaj internaciaj problemoj, sed la reveno de Kristo ŝanĝus ĉion ! Se vi volas partopreni, bonkore informu min, kaj eble pli malfrue mi indikos la respondon. Forgesu frumatene la mallumajn nubojn de militaverto, estu trankvila en la persono de tiu, kiu estas super ĉio. Ĉiu estas mirinda tago - Jesuo ne revenis vespere hieraŭ, ne noktomeze, kaj ne ĉe la kokokrio, kaj baldaŭ ni diros "ne frumatene". Ĉio estas aranĝota de nia ĉiela Patro, kiu kreis nin, rekreis nin kaj baldaŭ liberigos nin de pekinfluo !

## Preĝo

"Mi estu preta je la horo de via reveno, mia Savanto kaj Sinjoro."

J. F. Twilley, Britujo
(prediko n-ro 875)

John Frederic TWILLEY (*tùile*), brito (1914), edukita en kristana etoso, fariĝis dungito en komerco. Tiam komencis prediki kaj studis per korespondado en Wolsey Hall, Oxford ĝis licencio, fariĝis pastro en London kaj apud Bournemouth. Depost 1964, li senpage dissendas ĉiusemajnan predikon en Esperanto. La supra teksto estas unu el tiuj.

# EN LA VENTO
# SPIRITA
## ERLAND SUNDSTRÖM

Pensoj dum tempo
de Dia vizitado

Tradukita
el la sveda

ESPERANTO-MISIO, SVEDUJO



## LA REVENO DE JESUO : KION ATENDI ?

Ĉu estos du duaj revenoj ? Joh 14:3 kaj Heb 9:28
Ĉu estos du unuaj releviĝoj ? 1 Tes 4:16 kaj Apo 20:5
Ĉu estos du lastaj trompetoj ? 1 Kor 15:52 kaj Apo 10:7
k.t.p.

"Kristo mortis. Kristo releviĝis. Kristo revenos."
Tion proklamas kaj katolikoj kaj protestantoj.
"Mi kredas" aŭ "ni kredas ... Li revenos en gloro por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn."
Tion diras ĉiuj, kiuj uzas la kredon de Niceo.
Preskaŭ same respondas ĉiuj, kiuj uzas la t.n. Apostolan Kredon.
Tio estas tute taŭga, ĉar la Apostolo Paŭlo skribis :
"Ĉiufoje, kiam vi manĝos ĉi tiun panon kaj trinkos la kalikon, vi proklamos la morton de la Sinjoro, ĝis li venos." (1 Kor 11:25)
Sed efektive, pri kio ni pensas, kiam ni ripetas tiajn vortojn ?

La judoj mencias, en siaj ĉiusemajnaj preĝoj, la alvenon de la filo de David, sed ofte ili pensas pli pri la mesia aĝo, ol pri la Mesio mem. Tiel ankaŭ krisatanoj preĝas pli, ke la regno venu, ol ke la Reĝo venu.

Jesuo diris al siaj disĉiploj :
"Ne apartenas al vi scii tempojn aŭ epokojn, kiujn la Patro rezervis en Sia aŭtoritato." (Agoj 1:7)
Sed kelkaj kristanoj profetas la daton de la reveno de Kristo, kaj poste devas klarigi, kial ĝi ne okazis.

Mia Patro iam diris, ke la religiuloj de la unua jarcento eraris pri la ordo, en kiu okazos la finaj eventoj antaŭdiritaj en la Malnova Testamento, kaj estas facile simile erari pri la ordo de eventoj promesitaj en la Nova Testamento. Dum la unua duono de la nuna jarcento, oni ofte aŭdis detalajn priskribojn pri baldaŭ okazontaj eventoj. Sed nuntempe ni aŭdas similajn mesaĝojn, kompreneble ni dubas ĉu ili pravas. Estas iom da danĝero en tia argumentado, ĉar ni ne volas esti kiel mokemuloj kiuj diris :
"Kie estas la anonco de lia alveno ?
ĉar de kiam la patroj endormiĝis, ĉio restas kiel de post la komenco de la kreo." (2 Pet 3:4)
Tamen mi opinias, ke estas saĝe reekzameni niajn ideojn en la lumo de ĉio, kion ni nun scias pri la aĝo de la tero, kaj ĝia pozicio en la universo. Simile estas saĝe reesplori la Skribojn, por konstati,

Ĉu nia kompreno de tiaj aferoj estas vera ! (komparu Agoj 17:11)

Multaj, ne nur en Britujo, akceptis la notojn de la tiel nomata
Scofield Bible. Tamen, kiel diris D-ro Martyn Lloyd-Jones (*marten lojd ĝonz*), fama kimra predikisto, la Biblio de Scofield estis inspirita de Dio, sed liaj notoj ne !

Kelkaj kristanoj kredas ke Jesuo revenos tuj post la mil jaroj, pri kiuj oni legas en Apokalipso 20:1-7. Dua grupo diras : "Ne, li venos tuj antaŭ ilia komenco." Tria grupo diras : "Ni vidos lin sep jarojn pli frue." Kvara grupo diras : " Kristo jam estas Reĝo. La vorto 'jarmilo' signifas nur 'longan periodon'." Ili citas :

"Lia regno ne havos finon." (Lk 1:33)

Kelkaj leginte 1 Pet 3:13 :

"atendas novan ĉielon kaj novan teron, en kiuj loĝas justeco."

Aliaj legante Apo 5:10 en malnova traduko diras :

"Ni reĝos" ĉi tie "sutere."

Tria grupo legante la saman eltiraĵon Esperante diras : "Temas pri nuntempaj kristanoj kiuj eĉ nun reĝas surtere !"

Profesoro R. H. Lightfoot, kiu instruis min, kiam mi studis teologion en Oxford, diris pri la reveno de Jesuo :

"La Apostolo Paŭlo lasas nin ĉiujn en la aero !" (vidu 1 Tes 4:17) !

Pri tiaj malsamaj ideoj ni povas diri :

"La kaŝitaĵo apartenas al la Eternulo, nia Dio ; kaj la nekaŝitaĵo al ni kaj al niaj gefiloj eterne." (Rea 29:29)

Ĉu nia malfacilaĵo ne estas, ke ni tro ofte pensas laŭlitere, kaj forgesas, ke la Sankta Spirito ofte uzas metaforojn aŭ bildvortojn, por enkonduki al ni eternajn verojn ? Ofte ni forgesas ke la profetoj de Izrael aŭ de Judujo havis mesaĝojn por siaj aŭskultantoj. Ekzemple, kiam malamikoj ĉirkaŭis Jerusalemon ili promesis savon. Ne necesas ke tiaj eventoj sammaniere reokazu ! Ni ofte forgesas ankaŭ, ke kvar homoj povas paroli pri la sama evento uzante malsamajn vortojn. Se tio okazis pri la eventoj de la surtera vivo de Jesuo, kial ĝi ne povas okazi pri lia reveno ?

Mi sugestas, ke vi grafike indiku surpapere kio finfine okazos. De kie venos nia helpo ? Kio okazos al la mortintoj ? Kien iros la sanktuloj ? Kien iros la malamikoj ? Ĉu necese ĉio ĉi okazos tri aŭ eĉ kvar fojojn ?

"Nun ni vidas per spegulo, malhele ; sed tiam okulon ĉe okulo ; nun mi konas laŭparte ; sed tiam mi konos tiel same, kiel ankaŭ mi estas konita (1 Kor 13:12)






Estas pli taŭge demandi ne "Kion ni atendas ?" sed "Kiun ni atendas ?"

"Ni estos similaj al li ; ĉar ni vidos lin, kiel li estas. Kaj ĉiu, kiu havas ĉi tiun esperon rilate lin, sin sanktigas tiel same kiel li estas sankta." (1 Joh 3:2-3)


David Featherstone, Britujo

David FEATHERSTONE (*dejvid feθestoŭn*), brito, kiu verkis ankaŭ artikolojn en *Evangeliaj Kajeroj* 1 kaj 4, estas la sekretario de la loka komitato de la ekumena kongreso ĉe Annan Court en sudorienta Anglujo. Dum dek tri jaroj li preparis studentojn por instrui pri religiaj aferoj en britaj lernejoj.



ESPERANTISTA LIGO

*en la Ekumeno*



# KELI ★ DIA REGNO

Kristana Esperantista Ligo Internacia
Fondita en 1911

Neneŭtrala ligo, kunlaboranta kun U.E.A.
*Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prez.: A. Burkhardt, Ev. Pfarramt, D-7311 Bissingen/Teck, Fed. Resp. Germanujo.
Sekr.: E. van Dijk-Kuperus, Koningsmantel 4, 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando. Tel. 01720-20222.
Kotizoj: Rekta membro kun gazeto minimume 25 ned.gld. Membro-subtenanto 37,50 ned.gld. Membro de IKUE 12,50 ned.gld.

Monsendoj al poŝta ĝirkonto n-ro 5506132 de Kristana Esperantista Ligo Internacia KELI, van Hogendorplaan 4, 3135 CF Vlaardingen (Nederlando).

Dia Regno
Oficiala organo de KELI
Fond. 1908

Redaktoro: J. van Keulen, v. Beethovensingel 91A, 3131ED Vlaardingen, Nederlando. Tel. 010-4351198.

Abonprezo, sen membreco en KELI: 21 ned.gld. aŭ egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kaso de KELI, vidu supre.

Ekspedo de Dia Regno, membrolisto de KELI: L. Hordijk, van Hogendorplaan 4, 3135 CD Vlaardingen, Nederlando.

**Esperanto-Misio**

Box 7, Östansjö · 694 02 HALLSBERG 2 · Svedujo





## VENU VIA REGNO

Tiuj vortoj, el la Preĝo de nia Sinjoro, estas modelo, kiun ni malofte sekvas dum la propra preĝado. Kiam estis la lasta fojo, ke vi petis de Dio sendi Lian Regnon ? Fakte, ĉu tio estas dezirinda nuntempe ?

Unue, necesas kompreni ke la Dia Regno venos kun aŭ sen niaj penoj ; ne mankas informoj pri tio. Bonvolu permesi al mi fingromontri al vi iom el kio estas jam sciita.

Al la demando, ĉu venas la Regno de Dio, respondis Johano la Baptisto :

"Pentu, ĉar alproksimiĝis la regno de la ĉielo." (Mat 3:2)

Marko skribis (1:15) ke Jesuo diris :

"La tempo jam plenumiĝis, kaj la regno de Dio alproksimiĝis ; pentu, kaj kredu al la evangelio."

Sendube, tamen la Regno ne jam tute alvenis, ĝi estas tre proksima. Pri tio ni skribos plu poste.

Nu, kial ni dezirus ĝin ? Paŭlo skribis al la Romanoj (14:17) kaj al ni ke :

"la regno de Dio estas ne manĝado kaj trinkado, sed justeco kaj paco kaj ĝojo en la Sankta Spirito."

Eble tio forviŝas la orajn stratojn, ktp., sed restas, ke la venonta regno havas grandan valoron. Inter tiuj estas vera paco kaj ĉiu el ni devus strebi atingi tion. En Mateo 13:41-46 estas la paraboloj pri la trezoro kaŝita en kampo kaj la multevalora perlo. Tiuj paraboloj estas pri la Dia Regno. Ni ankaŭ scias (laŭ Mateo 6:33) ke ni "celu unue Lian regnon... kaj ĉio tio estos aldonita al vi." Certe, kiam alvenas la Regno, nenio mankas.

Ni scias tiujn, kiuj eniros kaj kiuj ne eniros la regnon. El la renkontado inter Nikodemo kaj Jesuo ni lernas ke :

"Se homo ne estas naskita el akvo kaj la Spirito, li ne povas eniri la regnon de Dio." (Joh 3:1-8)

Paŭlo ankaŭ skribis al la Efesanoj (5:5) ke

"... ĉiu malĉastulo kaj malpurulo kaj avidulo, kiu estas idolano, havas neniun heredon en la regno de Kristo kaj Dio."

La plej grava informo estas pri kiam la regno venos. Ĉiuj el ni legas de tempo al tempo pri ularo, kiu iras ien por renkonti la Savanton ĉar oni scias ke li alvenos je antaŭdirita tago. Ne estu trompita. La 24-a kaj 25-a ĉapitroj de Mateo donas multe da

informoj pri tiu tago. Jen estas nur parto el tiuj. Jesuo admonis nin :

"Estu pretaj ; ĉar en horo, kiam vi ne atendas, la Filo de homo venas."

Paŭlo certigis tion en lia unua letero al la Tesalonikanoj (5:2) skribante :

"Ĉar vi mem tute bone scias ke la tago de la Sinjoro venos, kiel ŝtelisto en la nokto."

Jesuo ankaŭ diris :

"Sed pri tiu tago kaj la horo scias neniu, eĉ ne la anĝeloj de la ĉielo, nek la Filo, sed la Patro sola."

Se Jesuo mem ne scias la tagon de ĉi tiu alveno, certiĝas ke nenia homido scias.

Se neniu scias kiam, kaj se falsaj kristoj kaj profetoj provas allogi nin, kiel ni certiĝos ke Jesuo vere revenas ? Jesuo diris ke :

"Ĉi tiu evangelio de la regno estos predikita tra la tuta mondo, kiel atesto al ĉiuj nacioj ; kaj tiam venos la fino."


Tia parto aŭ jam kompletiĝas aŭ estas preskaŭ kompletigita. La fino tamen venos nur tiam, kiam ĝi venos (Menoru ke neniu krom Dio, la Patro mem, scias). La signo estos tre videbla.

"Ĉar kiel fulmo venas el la oriento kaj montriĝas ĝis la okcidento, tiel ankaŭ estos la alesto de la Filo de homo."

Laŭ tio ne povos esti multe da dubo, ke tiam, kiam Jesuo revenos, ĉiuj scios.

Preĝu por rapidigi tian tagon kaj "estu pretaj" ! (Lk 21:34-36)

Edwin Harler, Usono







## LA SENCO KAJ CELO DE L'VIVO

*NDLR : László István petis de unu el liaj malnovaj amikoj, entuziasma "spiritekzamenanto", eksperimentulo, artikolon. Tiun Esperantigitan tekston mi redaktoris kaj prezentis kiel intervjuon. Kvankam treege diskutinda, la artikolo ŝajnis al mi interesa por aperi, almenaŭ por montri kiel pensas kelkaj niaj samtempuloj.* *P.C.*

Demando : Teologia profesoro Karl Rahner levis en la hungara radio, la 20-an de decembro 1983 la demandon, kiu interesas ĉiun : "kiel saviĝas tiuj nekredantoj, kiujn ni amas ?" Kion vi respondus ?

Respondo : El la disaŭdigo ni eksciis, ke la edzino de la redaktora raportisto estas kuracist-psikiatrino, kiu bone regas sian fakon. La harmonie funkcianta homa korpo estas sub tre multflanka kontrolo de la nervsistemo. La nervoj atestas pri tia krekapablo kaj potenco, kiuj ĉiun intelektan homon kondukas al la absoluta Di-koncepto. Aliflanke nia surtera ekzistado havas ankaŭ tiajn kromfenomenojn nenegeblajn, kiel pekon, malicon, suferon, malsanon, egajn maljustaĵojn, ktp., kaj tiuj formas ankaŭ konglomeraton por nei Dion.

La filozofio kaj la religia instruo havas la gravan taskon harmoniigi la dian perfektecon kun la amaso de la ceteraj malperfektaĵoj. Sed ilia respondo atendigas pri si de jarmiloj kaj pro tio ni spertas la senintereson pri kredo, kiu atingas nur nur la malprofundan gradon de la nura vivado por la hodiaŭo.

Ja, ni vere ne povas atendi ion alian de la multnombraj homamasoj, ĉar ili ankoraŭ devus evolui el tiu grado. Tamen ĉiam ekzistis, kaj ankaŭ hodiaŭ ekzistas, grace de Dio, observema, pensema, spirite jam vekiĝinta tavolo, kiun Li ne lasas sen helo.

Inter la Kreinto kaj liaj intelektaj kreitaĵoj ĉiam ekzistis spirita komunikado. Tiun komunikadon peris la profetoj, aŭ uzante hodiaŭajn konceptojn, diversaj perantoj (mediumoj), animoj, anĝeloj. Tiun pruvas mondskala, spiritfaka movado kaj ene altintelekta instrua literaturo, direktita per reputaciaj spiritoj. Tiuj donas perfektan klarigon de tiu demando-komplekso, por la multmiliona homamaso, serĉanta la veron.

Demando : Ĉu nun vi povas transdoni koncize diversajn viajn eltrovaĵojn ŝlosilajn ?

Respondo : Dio, la Praspirito, dum la komenco de la komencoj, baze de siaj kapabloj kaj sentrilataj pretendoj, kreis libervolajn, eternajn, evolukapablajn spiritajn estaĵojn. Li certigis (certigas)

ilian evoluon ĝis la al Li konforma, spirita kreskado. Tiuj spiritaj kreitaĵoj reagis diversmaniere je la diaj evoluigaj efikoj, radiintaj sur sin. La plimulto plenumis la esperojn de la Kreinto. Ĉi tie mi aludas al la 99 ŝafoj, kaj tre relativa minoritato ne plenumis tion (Lk 15:4). Ili, kvankam ne laŭ unueca mezuro, frontis la Kreinton. Ĉio ĉi estas konata ankaŭ en la rondoj de kristanismo. La senco de la baza kono, kiu kontraŭas la instruon de la Eklezio, estas, ke Dio ne volas rigardi definitive perditaj eĉ tiujn spiritojn, kiuj fariĝis kontraŭaj al Li, kaj ne volas puni ilin per eterna kondamno. Eĉ male ! Li rigardas kaj manipulas ilin kiel malŝparemulojn, spontane portempe foririntajn el la Patra hejmo (Lk 11:32). Li volas certigi la cirkonstancojn necesajn por ilia reboniĝo. Sed Li ne povas efiki je ilia intelekta kaj emocia mondo pro ilia sovaĝiĝo, per admonaj, instruaj vortoj. Pro tio, la Kreinto tiujn gefilojn, ankaŭ en ili mem malkorektajn, lokigas vestinte ilin en homan korpon al komuna, kolekta loko.

**Demando** : Vi do tiel klopodas klarigi la sencon kaj celon de la tera vivo ?

**Respondo** : Tie Li volas doni al ili aŭtomatan, praktikan instruon per la reciproke eltenebla sinteno, por ke ili konvinkiĝu, kaj pri la netolereblo de sia negativa starpunkto, aliflanke pri la neceso de la korektiĝo. Ĉi tiu pliboniga-eduka laboro okazas sur la lokoj de la suferoj, el kiuj unu estas nia tero. Do la kialon de niaj ekzisto kaj suferoj ni povas esprimi koncize en la antaŭaj diritaĵoj.

Precipe en nia jarcento oni bone povas percepti tiun inferan atmosferon de nia tero, mondmilitoj, terorismo, ktp., iom mildigitan per la malmultnombra tavolo de la pliboniĝintoj. La pozitivan, idean direktadon de tiu loko nia Sinjoro Jesuo plenumas per sia dipotenca, instrua mesianismo. Parte per la malnovtestamenta profetismo, per la moralkorektaj ideoj, transdonitaj dum la enkarniĝo.

Krome, ĉirkaŭ ekde 1850 per la amasaj instruoj, kiuj alvenis kunportitaj de nuntempaj profetoj de la spirita mondo, la Kreinto volas igi tiujn instruojn vivpraktiko, por ke tiuj spiritoj, elpaŝintaj el la tera vivo fariĝu denove akcepteblaj en la patran domon, t.e. en la mondon de pli alta morala pureco. La lernado, evoluo estas kontinua kaj preskaŭ senfina.

"Estu perfektaj, kiel via ĉiela Patro estas perfekta !"
(Mat 5:48)

La "meĥanika" ilo de ĉi tiu repuriga procezo estas la reenkarniĝo. Nome, la teran vivon sekvas ia transmonda taksado kaj nova





fikso de celo, poste fizikaj-korektaj enkarniĝoj, kvazaŭ graca aranĝo (Lk 15:17-19). Helpe de tiu graco, kiu destinis sin por korekti, konverti laŭ la konsiloj de Jesuo, la spirito denove povas barakti per seriozaj, bonvolaj vivperiodoj por tiuj diaj aferoj, kiujn li iam perdis (*Allversöhnung*).

**Demando** : Sed, kaj Dio en tio ?

**Respondo** : Jes ja, estas decide grava afero, ke dum la serĉado de senco kaj celo de vivo, ni prijuĝu la kapablojn kaj direktan stilon de Dio, ne laŭbaze de la amasoj, ofte treege malperfektaj. Je tiu bazo ni povus perdi nian kredon. Sed ni rimarku, ke la dia graco, tian miridan korektan-evoluigan loĝlokon, funkciigas eĉ por la spiritamaso, malmoraliĝinta en infera profundo pro nia pramalobeemo. Tiu loĝloko ja en nia nuna stato estas nur difektita ombrobildo de la di-harmoniaj lokoj de altmoralaj, gloraj spiritoj.

**Demando** : Sed, via kompreno ne estas kutima en teologio.

**Respondo** : Ĉi tie povas esti komprenebla tiu rimarko, ke ĉio ĉi apartenas jam al la tereno de la kredo. Sed la pli radikala enprofundiĝo en la temantan problemaron kaj la zorgema kontrola ekzameno de la detaloj, konvinkos nin pri tio, ke ĉi tiu homa viv- kaj celdifino estas absolute subtenita kaj akceptebla afero, kaj el Biblia vidpunkto kaj por la logika intelekto.

Nome ni vane serĉus pli bonan, pli belan, intelektan fundamenton. Ĉi tiu eklumigo fariĝis publika trezoro ĉirkaŭ depost cent jaroj kaj estas tre bedaŭrinde, ke la laikaj kaj ekleziaj fakuloj forgesis rigardi al la fontoterenoj de la vera helo (Joh 14:16,26 ; 15:26 ; 16:12-15). Ili preterlasis la mondskalajn manifestiĝojn de la hodiaŭa profetismo.

La koncizaj dirindaĵoj kaj la sugesto de ĉi tiu skribaĵo certe estas kritikeblaj el pluraj vidpunktoj. Sed mi kuraĝas aserti per trankvila konscienco, ke mi pasigis mian tutan vivon (70 jarojn !) por serĉi la respondon al tiuj demandoj. Per la graco de Dio mi sentas, ke mi atingis tiajn verajn ekkonojn, kiuj ne nur feliĉigas min, sed krome kiuj devigas min por plua progreso.

Mia vivocelo estas, ke mi helpu al tio laŭeble plurajn animojn.

Balog Dezső, Hungarujo

Mendu rekte ĉe


Ŝanĝopunkto, La, Jeremi Gishron. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1987. 38p. 14cm. Mimeo. Brol. Pensoj pri la koncepto de monointerŝanĝo. Prezo: 9,90 gld.




# eldonejo sivron

P.O.K. 231 80, IL-91 251 Jerusalem, Israel.

Vi ricevos 37%-an rabaton sur ĉiuj prezoj de ĉi tiu paĝo.




Ortoduksa esperantismo; La lukto por unueco, Erco Baraka. Jerusalemo: Eld. Sivron, 1985. 9p. Mimeo. 15cm. Eseo pri la evoluo de la esperantismo dum la fruaj jaroj; kun notoj kaj bibliografio. Prezo: 4,20 gld.

Zamenhof and Esperanto, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Sivron, 1986. 10p. 15cm. Prezo: 4,20 gld.


Zamenhof et l'espéranto, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10p. 15cm. Brol. Prezo: 4,20 gld.

Zamenhof and Esperanto, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10p. 15cm. Brol. Prezo: 4,20 gld.

Zamenhof y el esperanto, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10p. 15cm. Brol. Prezo: 4,20 gld.

Historio de la Esperanto-movado en Israelo (represo el Israela Esperantisto, 1982), A. Wandel (1954). Jerusalemo: Sivron, 1986. 8p. 15cm. Prezo: 2,10 gld.

Lingvo kaj religio; Studo pri la frua esperantismo kun ciala atento al L.L. Zamenhof, Jeremi Gishron (194 Jerusalem: Sivron, 1986. 212p. 14cm. Prezo: 36,00 gld.




Urba oazo, D. Mager (1954) kaj J. Gishron (1948). Jerusalemo: Sivron, 1986. 10p. Ilus. 15cm. Originalaj poemoj. Prezo: 4,80 gld.

Mia kara moito; Amikaj poemoj, Erco Baraka. Jerusalemo: Eld. Sivron, 1986. 12p. Ilus. 15cm. Originalaj poemoj. Prezo: 4,80 gld.

Eli kaj Jahu; Poemoj el la Sankta Lando, Erco Baraka kaj David Mager. Jerusalemo: Eld. Sivron, 1986. 15p. Mimeo. 15cm. Originalaj poemoj, plejparte tilataj al Esperanto. Prezo: 6,30 gld.

Kosma amo, Josef Kohen-Cedek (1903). Originalaj poemoj. Jerusalemo: Sivron, 1986. 14p. Ilus. 15cm. Prezo: 6,30 gld.



## NENIO NOVA SUB LA SUNO

"Bone kirlu" povus esti la ĉefa indiko en la kuirrecepto de la Nova Epoko.

La Nova Epoko (angle *New Age*) ne estas organizita movado. Ĝi estas kultura ondo, kiu disvolviĝis iom post iom. Ĝi estas kombinaĵo de diversaj "simpatiaj" "eltrovaĵoj". Tiuj ĉi povas ordiĝi por konsistigi tuton, komprenon de nia mondo, novan mitologion, aŭ pli ĝuste mitaron. La diversaj eroj tute ne estas ligitaj unu al la alia. Ili alvenis en diversaj epokoj, sendepende, sed nun ili ŝajne kompletigas unu la alian.

La sistemo Nova Epoko fariĝis pli grava kaj efika, kiam gravaj personoj, kiel Shirley MacLaine, aŭ firmaoj kiel I.B.M. en staĝoj apogis ĝin.

Inter la diversaj fontoj troviĝas pli tujaj, kaj pli foraj, kelkaj kiuj provizas dogmojn, kaj aliaj kiuj provizas etoson.

La plej sistemiga kaj rekta estas teozofio. Tiun ĉi sistemon iniciatis S-ino Blavatsky (1831-1892). Ĝi jam estas kombinaĵo de diversaj esoteraj, okultismaj ideoj. En ĝi oni retrovas multajn orientajn (hindiajn) dogmojn, ekzmple la reenkarniĝon.

Al tiu ĉi spirito aldoniĝis parencaj dogmoj kaj/aŭ "teknikoj", kiel jogo. La tibeta religio, vidata tra okultisma okulo, fariĝas sufiĉe grava, ekzemple pere de la libroj de la (pseŭdo-) tibeta lamao T. Lobsang Rampa, ŝajne simple angla metiisto. Alia pli moderna kaj pli okcidenta dogmaro alvenis, nome spiritismo. Aldoniĝas ankaŭ sableroj el mormonismo.

Jam ĉi tio aperas kiel stranga miksaĵo. Sed mi diris : "bone kirlu !"

Oni nun ne devas forgesi la tre antikva astrologio, cetere kiel la aliaj, ŝajne "science" pruvita. Oni ankaŭ aldonu pinĉopreno da NIFO-ismo kaj da atlantidismo.

Kompreneble oni ne preterlasu la metapsikion, kun siaj diversaj fenomenoj, kiel EPS (ekstra-senta percepto) aŭ kiel la telekinezo.

Nun ni pritraktu la etoson, la ĉirkaŭon, esencan.

Plene gravas la antaŭnelongaj sciencaj teorioj/eltrovaĵoj de evoluismo kaj de astrofiziko. Tiuj kondukis kelkajn sciencistojn al la t.n. Princetona Gnozo (Princeton, usona fama universitato).

Same gravas la nuna intereso pri ekologio, sed tute alia ol la kristana intereso pri konservado de la kreitaĵo. En tiuj medioj, tuŝitaj de la Nova Epoko, estas en granda favoro la t.n. mildaj medicinoj, akupunkturo, homeopatio, ktp.

Mi devas aldoni, ke sociologiaj esploroj kaj analizoj puŝas en la sama direkto, pri la observataj cikloj en la socia evoluo, kaj pri la rolo de mitoj, kaj ties nuna ŝajna malapero. Ne estas hazarde, ke nun pluraj anoncas la finon de la "fiŝa erao", la epoko de kristanismo (ἰχθυς), kaj la alvenon de nova "amfora erao" (vidu la muzikalon *Hair* kaj ties kanton *The Age of Aquarius*).

Kelkaj volutoj el tiu nubaro, eĉ kondukis al naziismo, strange sed tre probable. Kaj nun ... ?

Sed el tiu ŝajna kaĉo, kies mikspoton oni povas pensi plena, oni povas eltiri kelkajn ĉefajn liniojn, kaj kelkajn dogmojn, pri kiuj vi tre certe jam aŭdis aŭ legis. Kaj la unueco de la tuto aperos pli evidenta.

La kerno de la tuta sistemo kuŝas en la filozofio de evoluismo. Ĉio evoluas. Ĉio perfektiĝas. Ligita kun la hindueca nocio pri perfekteco, kaj kun la analizo de tiu evoluo en cikloj, tiu ĉi ideo kondukas al pesimismo pri la nuna mondo. Oni anoncas kaj ekologian kaj ekonomian katastrofon. Oni timas la nuklean militon, la koleron de la tertremoj, ktp. Vere nia mondo baldaŭ malaperos. Ni preparu la Novan Epokon, la "amforan eraon". Gravas en tiu direkto la verkoj de la sudafrika verkistino Johanna Brandt. Plie, en tiu periodo revenos gravaj figuroj, kiel eble Kristo, aŭ la reĝo Arthur. Kelkaj eĉ atendis la revenon de Gandalf, heroo de la Romano *The Lord of the Rings* (La sinjoro de la ringoj) de la angla verkisto J.R.R. Tolkien ! Konsekvence, oni povas certiĝi ke jam estis grandaj civilizoj, pasintaj, kiel Atlantido, aŭ tiun de la kontinento Mu. Oni povas ankaŭ certiĝi ke ekzistas eksterteraj civilizoj. Eble eĉ ili estas kaŭzoj de nia estiĝo, aŭ almenaŭ de nia civiliziĝo.

La "dogmoj" estas same plurdevenaj, sed tamen tra diversaj kanaloj ĉefe fontas el Hindio, aŭ almenaŭ Azio.

La celo de nia mondo estas, kaj la celo de nia vivo devas esti, la universa harmonio. Oni devas vivi harmonie kun la cetero de la universo. Bone, ĉu ? Kiu ne akceptos ĉi tion ? Sed kial ? Jen la monismo, kiu fluas tra la tuta sistemo. Dio estas en ĉio, ĉio estas Dio, kaj la celo de la homo estas fine kunfandiĝi en tiun ĉi tuton, en la diecon, en Dion mem. Kaj tra tiu ĉi universo-dio kuras "energion". Ĝi kuras tra forto-linioj, tra meridianoj, en la mondo, en





la tero, en la homa korpo. Ĉar la naturo apartenas ankaŭ al la dieco, ĝi estas respektenda kiel la homo.

Kun tiu ĉi celo, kiel vojaĝas la homo, am pli ĝuste la homa spirito ? Ĝi vojaĝas de korpo al korpo, pere de reenkarniĝo(j) al la renkonto en Dion. Konsekvence, la celo, la devo de ĉiu estas perfektiĝi. Per la mem-kono, tra spiritaj kaj korpaj ekzercoj, la homo atingas stadion, kiu se ne nirvano, almenaŭ alproksimiĝas al ĝi.

Fakte tiuj ĉi memperfektigo per ekzercoj, kaj alvenigo de la "Amfora Erao" estas kvazaŭ evangelio de la regno, sed de regno sen Dio, sen Jesuo Kristo. Tian fenomenon la kristanoj ne povas ignori. Tiujn homojn, kiuj ne estas materialistoj, kiuj estas spiritaj iasence, oni devas alparoli konsekvence. Kun ili estas alkroĉpunktoj, sed ankaŭ kelkaj gravaj miskomprenoj. Ni atentu pri la pezo de niaj vortoj, kaj pri ilia enhavo.

Antaŭ tiu ĉi fenomeno, pluraj kristanaj reagoj estas evitendaj.

Kelkaj kristanoj tuj proklamas kvarantenon. Ĉio, kio venas el la Nova Epoko estas malbona. Eĉ, ĉio, kio iel rilatas al ĝi estas tabua, kaj oni havu neniun kontakton kun ĝi. Ankoraŭ pli, manio, kvazaŭ paranojo, kondukas al vidi la Novan Epokon multloke, eĉ kaŝitan en kristana vesto.

Aliaj, kiel strutoj, volas vidi nenion. "Certe tio ne povas okazi apud mi, nur en la fora lando."

Ankaŭ estas kristanoj, kiuj tiel konformiĝas al la mondo, ke ili diras ke la Nova Epoko estis profete anoncita en la Biblio. Estas eĉ kameleonoj, kiuj kompromisas sian kristanismon, praktikante ekzemple "kristanan" jogon.

Sed, por bone aliri tiun ĉi novan religion, oni unue devas esti firma en sia kristana kredo, por vidi, kiel Paŭlo en Ateno, tra kiu pordo oni povas eniri la menson de sekvanto de tiu nova kompreno, por prediki la Evangelion de la Regno de Dio, per Jesuo Kristo. Eĉ en tiu ĉi Nov-Epoka sistemo estas kelkaj kulturaj valoroj, sur kiuj oni povas sin apogi, eĉ kiuj pli valoras ol la kutimaj materialismaj valoroj pri la sama temo. Tamen ni devas emfazi, ke por kristanismo, oni povas/devas distingi inter vero kaj malvero, kaj disigi unu de la alia, kiam por la Nova Epoko multo restas en arta malprecizeco. Same, por kristanoj, la transformo de la homo, kaj de la socio, okazas ne normale, sed per kaj pro Dio, Dio, kiu kreis la universon, do ekzistas sendepende de ĝi, kaj havas personecon, kaj personajn rilatojn kun la homo, kun iu homo.

Ĉu ni atendu do la Novan Epokon, kiu certe alvenos, kiam estos la tempo, aŭ la Regnon de Dio, en la horo kiun Li konas, Regnon kies spurojn ni jam vivas dank'al Jesuo Kristo.

Philippe Cousson, Francujo

Por verki tiun ĉi artikoleton, mi uzis artikolojn el *Christianity Today*, de 1989-01-13 kaj de 1988-09-02, kaj el *IDEA* (Francio) de 1989-04.

MI JAM ESTAS PLI OL 80-JARA, sed mi estas juna kaj malfermita al ĉiuj nuntempaj problemoj. Mi estas la plej malnova Esperanto-revuo daŭre aperanta.

IKUE, Via Berni 9, I-00185 *Roma* RM (Italio).

Jarabono: 25 svisaj fr. aŭ egalvaloro; nepagipovaj skribu por interkonsento.

espero katolika

**PROGRAMOJ EN ESPERANTO**

RADIO VATIKANA · Esperanto-redakcio · 00120 CITTÀ DEL VATICANO

Programa Esperanto 世界語節目 البرنامج الاسبرانتو Esperanto Programme

Dimanĉe: h. 19 UTC -

1530 kHz (196 m), 6190 kHz (48 m), 6248 kHz (48m), 7250 kHz (41 m), 9625 kHz (31 m), 9645 (31 m), 11700 kHz (31 m), 15120 kHz (19 m).
*Por la zono de Romo:* 526 kHz (570 m) kaj 93.3 - 96.3 - 105.0 MHz FM

Jaŭde: h. 05 UTC -

1611 kHz (186,2 m), 6248 kHz (48 m), 7250 kHz (41 m), 9755 kHz (31 m), 11715 kHz (25 m).





## LA FRANCA REVOLUCIO : PROTESTANTA RIGARDO

Dum sia sepa studkunveno (17-19 de februaro 1989), "La franca Revolucio : protestanta rigardo", la libera fakultato pri reformita teologio (faculté libre de théologie réformée) de Aix en Provence (*eksãprovãns'*) daŭrigis la pripensadon komencitan dum sia kolokvo de 7-8 de oktobro 1988. Antaŭvidi du renkontojn pri tiu temo povos ŝajni troa por kelkaj ! Tamen, la Revolucio prezentiĝas kiel evento sufiĉe grava por dediĉi tempon al ĝi. Estas gravege kliniĝi super la pasinteco, serĉi kompreni ĝin en ties diverseco kaj komplekseco, ĉar ni dependas de ĝi. Fakte, tiu ĉi meditado pri historio permesas pli bone situi en la nuno, kaj havi atestadon pli konsekvencan.

Dum du tagoj, inter 45 kaj 75 personoj, el sufiĉe diversaj horizontoj provis kompreni, en kristana perspektivo, tiun ĉi draman momenton de historio. La konferencoj kelkfoje estigis intensajn debatojn kaj stimulis renovigitan kaj pliprofundigitan pripensadon pri temo, kiu estas malfacila por studi en ĝia tuta realeco, tiel forta estas la tento pri idealigo !

La unua intenco de tiu ĉi studkunveno estis pli bone kompreni, kiu spirito kaj kiu pensmaniero markis la Revolucion, kaj, trans la diverseco de la pensfamilioj, identigi tiujn, kiuj estis la bazmotivoj, la subkuŝantaj antaŭsupozoj. Neniel temis pri kontesti la pason de la malnova reĝimo al la moderneco, nek malagnoski tion, kio dum tiu malkvieta kaj konfuzita periodo de la historio estis pozitiva.

En la unua konferenco titolita "La kontraŭ-kristana ideologio de la Revolucio, fonto kaj disvolviĝo", Pierre Courthial (*pjer' kurtjal'*) substrekis forte ke :

> "La franca Revolucio estis unue kaj daŭre 'ideologia' kontraŭ-kristana movado, kiu enskribiĝis en la pli vasta 'humanisma' movado, kiu kuras ek de la Renesanco kaj de la Lumoj ĝis la oktobra Revolucio en Rusio, kaj pretere ĝis ni."

Fakte, estas precipe post la Lumoj, ke la kaŭzintoj de la Revolucio devis ĉerpi siajn ideojn. Al la bazmotivo de la biblia Revelacio, kreado, falo, elaĉeto, ili oponis tiun de la ĉirkaŭa humanismo : naturo, aŭtonomio. Tio ne signifas, ke la Revolucio donis nenion "bonan, belan kaj veran". Oni povas pensi, speciale, pri la nocioj de libereco, toleremo, homeco kaj progresvolo. Sed la perspektivo, en kiu tiuj ĉi valoroj enestas, ne estas indiferenta. Ilia signifo kaj ilia senco dependas de tio.

Profesoro Jean-Marc Daumas (*ʒã mark' domas'*) poste elvokis la "protestantajn poziciojn en la Revolucia epoko". Se, en la unuaj fazoj,

> "la Revolucio respondis al la deziroj pri emancipiĝo de la protestantoj, oni konstatas en la tria fazo, tiu de la Nacia Konvencio (Convention Nationale, sept. 1792-okt. 1795) katastrofan turniĝon por la Reformitaj Eklezioj. Ĉar "la Reformita Diservo ĉesis en preskaŭ la tuta Francio de junio 1794 ĝis marto 1795." Tro atendinte de la Revolucio, kaj tro ofte aliĝinte al ĝia humanisma spirito, la protestantoj malfacile rezistis fronte al la persekuto. Sekve la Eklezio de la 19-a jarcento travivos multajn malfacilaĵojn por releviĝi, kaj oni vidos ekaperi nov-protestantismon kun doktrina kaj spirita identeco konsterniga."

Prezentinte kristanan filozofion pri historio, inspiritan aparte de Merle d'Aubigné kaj Agrippa d'Aubigné (*merl' dobinje, agripa dobinje)*, Jean-Marc Berthoud (*bertu*), de Lausanne (*lozan'*, Laŭzano), ektraktis, foje polemike, la sekvantan temon : "la franca Revolucio kaj la revolucioj". Substrekante la troojn kaj la malbonajn uzojn de la absoluta monarkia potenco, li atingis la kritikan analizon de P. Courthial, kaj substrekis la parencecon de la rusa Revolucio kun la franca Revolucio. Ja, la ideologioj diverĝas, sed ili dependas de la sama bazmotivo, naturo-aŭtonomio, propra al la homo kiu asertas esti la mezuro de ĉio. Ne volante idealigi la anglan kaj usonan revoluciojn (ne okazas ŝanĝoj sen batoj kaj pekoj), oni devas konstati, ke ili okazis alimaniere. Malpli entutigantaj, kaj pli modestaj, ili ricevis la profiton de la jud-kristana pensmaniero. Ĉu Régis Debray (*reĵis' debre*) ne antaŭnelonge diris ĉe la televido, ke la granda malsameco inter la franca kaj la usona Revolucioj estis en la fakto, ke la unua havis kiel ununuran fundamenton la spiriton de la homo, kiam la alia enradikiĝis en Dio mem ?

La filmo de Wajda, *Danton (vajda, dãtõ)*, permesis al ni, pere de la kreiva imago, de bildo kaj emocioj, ekkapti la tutan hororon de tiu ĉi ŝanĝo, kiu joras, ĉar ĝi baziĝas nur sur la homa volo, aŭ tiu de elito, kaj kiu finfine, povas nur perfidi la idealojn kaj la valorojn de la Revolucio mem ! Rilate ĉi tion, la batalo por la potenco inter Danton kaj Robespierre (*robespjer'*) estas frapa. Kaptitaj en radoaro, kiun ili certe ne antaŭvidis, du homoj frontas unu la alian ĝis la morto, neniam tute perdante sian homan vizaĝon.

Prenante la nocion pri utopio en ĝia literatura signifo, kia ĝi estis ilustrita de la ekzemplo de *Utopia* de Th. More, profesoro Christian Rouvière (*kristjã ruvjer'*) pritraktis klare la temon de la "revolucia utopio". Kriztempe, la homo sentas la bezonon malligiĝi el la historia situacio kaj fari revenon al la tempoj de la originoj. Li volas rekrei la harmonian civiton, cele al retrovo de respondo pri la kontraŭdiroj, kiujn li perceptas, pri la angoroj, kiujn li sentas, kaj pri la limoj, kiujn li konstatas. En siaj streboj por starigi idealan socion, la utopioj estas paradokse devigataj reguligi la homajn rilatojn per trudo. Privilegiante la ŝtaton, preskaŭ diigante ĝin, utopio akcelas la kontrolon de la privata vivo kaj de la familio ; laŭdegante la komunecon de havaĵoj, ĝi atingas la privatan proprietecon ; fine proponante liberigi la homon el lia angoro kaj lia finiteco, ĝi anstataŭas la kristanan elaĉeton. Kontraste kun la Revolucio, kiu supertaksas historion, utopio malvalorigas historion.





El la ekzisto de duobla serio de tekstoj, la unua "revolucieca", ekz-e Gal 3:28, kaj la dua "reakcieca", ekz-e Ro 13, profesoro Peter Jones (*piter' ĝons'*) prezentis "la nov-testamentajn fundamentojn de la socia ordo". Elvokante la sferojn de politiko, ekonomio kaj de la paro-familio, li substrekis, ke la noveco de la Evangelio eniĝas en strukturoj, kiujn Dio starigis dum la kreado. La Eklezio estas la loko, kie tiu ĉi ordo estas samtempe konservita kaj renovigita. Kristo mem invitas sian Eklezion labori, proklamante la Evangelion kaj estante la salo de la tero, cele al la antaŭenigo de la Regno ; sed tiu ĉi lasta stariĝos plenece nur kiam la Sinjoro revenos en sia tuta gloro.

Poste Udo Middlemann, antaŭa kunlaborinto de Francis Schaeffer, kondukis pripenson, lumigitan per sia sperto de la nuntempa mondo ; tiel li skizis sagace la "kristanajn perspektivojn por mondo en revolucio". Fronte al la vivkondiĉoj tro revoltigaj, la mondo bezonas ŝanĝon. Sed por alfronti la imanentan religion, la trofarojn de la ŝtato, la pretendojn de politiko kaj ekonomio, la totalismajn ideologiojn, estas pluraj eblaj revolucioj : tiu, kies inspiro estas la moderna relativismo, kiu difinas la mondon laŭ la deziroj de la homo, kaj kiu trovas en la fundo de ĉi tiu la fonton de sia elano ; tiu, kies inspiro estas la biblia perspektivo, kiu difinas la mondon laŭ "la deoriginaj difinoj de la Kreinto", kaj kiu ĉerpas, en la Vorto de la vivanta Dio, saĝecon kaj vivecon. En mondo vivanta en la ombro de la morto, gravas disvolvi pensmanieron, kiu agnoskante la realon, estas lumigita, en ĉiuj sferoj de la penso kaj de la vivo, de la instruoj de la Biblio.

La studkunveno volis kuraĝigi pripenson pli proksiman al la realo, kaj lumigitan per kristana rigardo. Multaj punktoj meritas esti restudataj kaj pliprofundigataj. Jen kelkaj :

a) Daŭrigi la studon kaj la meditadon de historio, cele al pli bona kompreno de la radikoj de la nuno kaj, se eble, dank'al Dio,

al estonta evito de la eraroj kaj de la frenezo de la pasinteco.

b) Identigante la antaŭsupozojn, la bazmotivojn de la ne-kristanaj perspektivoj, pli bone aperigi ĉion pozitivan, kion cetere ili entenas (ekz-e, la homajn rajtojn).

c) Kiel esti kunbatalantoj kontraŭ la maljustecoj kaj la malbono ne fariĝante aliancano de la malamikaj ideologioj kaj filozofioj.

d) Disvolvi efikan kristanan ateston, kiu enradikiĝas en pensmaniero, kiu tiras sian tutan substancon el la biblia perspektivo. "Tia oni estas, kia oni pensas esti".

e) Vivi antaŭ Dio en la kadro de la realo, de la realo de la kreitaro, de la familio, de la laborlokoj, de la civito, de la Eklezio, ... Celi fidelecon ĉiam pli grandan, atendante ke Kristo manifestiĝos la pelnecon de la Regno.

Pierre Berthoud, Francujo
tradukita de Philippe Cousson kun permeso

Pierre BERTHOUD (1943), franco, dekano de la libera fakultato pri reformita teologio de Aix-en-Provence (Suda Francio), ne esperantisto.





# MESAĜO AL LA KRISTANOJ DE EŬROPO

el la kunveno de Basel (Bazelo) 15-21.05.1989

Karaj gefratoj,

1. Unuafoje, delegitoj el ĉiuj eŭropaj eklezioj kunvenis, el oriento kaj okcidento, el nordo kaj sudo, preter la konfesiaj kaj politikaj limoj, kiuj ŝajnis antaŭnelonge ankoraŭ ne transireblaj. Kiel ajn profundaj estis la vundoj de la pasinteco en Eŭropo, la ligiloj, kiuj unuigas nin en Kristo aperis pli fortaj. Kunuleco naskiĝadas, kiu plenigas nin de espero kaj danko.

2. "Justeco kaj paco sin kisas". Tiu ĉi parolo de la psalmisto konsistigas la gvidan ideon de nia kunveno. Sed kiel foraj ni estas el tiu ĉi promeso ! Milionoj da viroj, da virinoj kaj infanoj estas viktimoj de malriĉeco, de malsato, de milito. La fundamentaj rajtoj de la homo estas konstante perfortigitaj. Bestaj kaj plantaj specioj definitive malaperas. La vivoj de ni ĉiuj, kaj de la venontaj generacioj estas pridemandataj hodiaŭ.

3. Kion diras la Evangelio, tiuhore, al ni, eŭropaj kristanoj ? La unua kondiĉo de ĉiu kredebla atesto estas la konvertiĝo : konvertiĝo al la Kreinto, kiu, en Sia amo zorgas pri ĉiu el Siaj kreitaĵoj ; konvertiĝo al Jesuo Kristo, Filo de Dio, kiu donis al ni la ekzemplon de la aŭtentika homeco ; konvertiĝo al la Sankta Spirito, fonto de nova vivo. Kiel eŭropaj kristanoj, ni grande partoprenis en la kaŭzoj de la nuna krizo. Tial ni petas Dion, ke Li pardonu nian kulpon, kaj ke Li donu al ni la forton konvertiĝi por fariĝi iloj de paco.

4. La intenco de Dio por la homaro fine restas mistero, kiun neniu povas esplori. Sed, konfidante la Evangelion, ni estas certaj ke Dio kondukos Sian kreitaĵon al la elaĉeto. Fortaj pro tiu certeco, ni rezistos ĉian fatalismon. Kiel la apostolo Paŭlo, ni estas komisiitaj hodiaŭ transdoni la inviton : Lasu vin esti repacigitaj kun Dio ! Sed sin lasi esti repacigita kun Dio, signifas samtempe rezisti la potencojn de detruo kaj de morto !

- Ĉiu homa estaĵo, sendepende de la sekso, de la raso, de la nacio aŭ de la lingvo, portas en si la bildon de Dio kaj konsekvence estas plenparte membro de la socio. Ni klare atestu, ke estas Kristo mem, kiu suferas en tiuj, kies digno estas piedpremita ; ni sekvu lian ekzemplon, kiam li staras apud la premataj, apud la senigitoj je la rajtoj, apud la viktimoj de torturo. Ni volas aserti la rajtojn de la rifuĝintoj, kaj ni nin devontigas edifi komunumon

en kiu viroj kaj virinoj havu egalajn respondecojn.

- La malriĉeco kaj la malsato estas skandalo, kiu devas lasi al ni neniun ripozon. Ni nin devontigas dividi tiel mondskale, kiel en niaj respektivaj medioj, kaj ni subtenos ĉiun decidon kapablan malpezigi la ŝarĝon de la ŝuldo, kiu sufokas tiom da landoj el la tria mondo.

- Necesas supervenki la militon, kiel rimedon por solvi la konfliktojn. Ĉiu en sia lando, ni uzados ĉion por ke efektiviĝu la vizion de komuna sekureco. Ni devontigas nin hodiaŭ krei trans la landlimoj konfido-klimaton, en kiu povos kreski la volo atingi senarmigon, kiel nuklean tiel kemian kaj konvencian. La atesto de neperforto neeviteble partoprenas en la marŝo al repacigo.

- Ni luktu kontraŭ la iluzio, ke la ekspluatado de la naturo estas senlima. La paraj rilatoj kun la naturo antaŭsupozas la rezignon pri la strukturoj, kiuj minacas la vivon en ekonomio kaj socio. Ni klare konstatis, ankoraŭfoje, dum la pasintaj tagoj, ke la nuna konsumado de rimedoj kaj energio devas esti firme malgrandigita. Tio ĉi postulas de ni simplan vivostilon, draste transformitan.

5. Ni bezonas unu la aliajn por plenumi la taskon, kiu estis komisiita al ni. La interligo de Dio en Jesuo Kristo estas reala fakto. Fortaj pro tiu promeso, ni volas restadi en la frata komunumo kaj en la solidareco. La politikaj kaj sociaj transformiĝoj, kiuj estiĝas en Eŭropo hodiaŭ konsistigas por ni kialojn por esperi. Ni volas kontribui kune al tio, ke la justeco, la volo pri dialogo, kaj la respekto de la donacoj de la kreitaro necesiĝu ĉiam pli evidente. Kiel la krizo iras preter la naciaj landlimoj, tiel nia kunuleco devas same preteriri ilin. Ĝi devas esti malfermata al amikeco kaj al kunlaboro kun ĉiuj ĉi tiuj, kiuj serĉas pacon kaj justecon, kiuj ajn estas iliaj religio aŭ konvinkoj. Estas tiel nur, ke ĝi fariĝu signo de espero en minacata kaj dividita mondo.

La Spirito de Dio, kiu kunigis nin ĉi tie, agados ĉiam preter niajn atendojn. Ni kredas, ke ĝi estas agadanta por ĝermigi la grajnon semitan. Tia estas nia espero. Tia estas nia preĝo.

provizora traduko de Philippe Cousson



BERVELING (Gerrit). - *Regno de Dio, revo de Dio.*
*Evangeliaj Kajeroj*, 1989, 5, pp. 3-6.

La tekstoj NOMBROJ 24:15-17 kaj LUKO 1:46-55 montras la ecojn de la REGNO DE DIO.

COUSSON (Philippe). - *Kiu regno de Dio ?*
*Evangeliaj Kajeroj*, 1989, 5, pp. 7-12.

Ĉu RELIGIO regu la SOCIOn ? Kiun REGNOn DE DIO venigi ?

Tiuj ĉi paĝoj estas modeloj por reprodukti katalog-slipojn. Sur ĉiu estas indeksa resumo, kun la deskriptoroj (ŝlosilvortoj) majuskle indikitaj.. Malantaŭ ĉiu estas la tradukoj de tiu ĉi resumo.

Les textes NOMBRES 24:15-17 et LUC 1:46-55 montrent les caractéristiques du ROYAUME DE DIEU.

I testi NUMERI 24:15-17 e LUCA 1:46-55 mostrano le caratteristiche del REGNO DI DIO .

Los textos de NÚMEROS 24:15-17 y LUCAS 1:46-55 muestran las características del REINO DE DIOS.

The texts NUMBERS 24:15-17 and LUKE 1:46-55 shows the characteristics of the KINGDOM OF GOD.

Die Texte NUMERI 24:15-17 und LUCAS 1:46-55 zeigen die Eigenschaften des REICHes GOTTES.

La RELIGION doit-elle régir la SOCIETE ? Quel ROYAUME DE DIEU faire venir ?

La RELIGIONE deve governare la SOCIETA' ? Quale REGNO DI DIO promuovere ?

¿ Ha de ser la RELIGIÓN la que rija la SOCIEDAD ? ¿Qué REINO DE DIOS hacer venir a nosotros ?

Should RELIGION govern SOCIETY ? Which KINGDOM OF GOD do we want to come ?

Soll die GESELLSCHAFT von der RELIGION beherrscht werden ? Welches REICH GOTTES wollen wir herbeiführen ?



TUINDER (Jacques). - *Homoj konstruas al si malregnon.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 1989, 5, pp. 13-19.

GENEZO 11:1-9 permesas kompari la HOMAn CIVITOn kaj la REGNOn DE DIO.

MARTIN (Hugh). - *La reveno de Jesuo, motivo por la Eklezio.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 1989, 5, pp. 21-25.

Kiel atendi la REVENOn DE JESUO KRISTO kaj vivi la ĈEESTOn DE JESUO KRISTO ?

plurlingva kristana tesoŭro
multilingual christian thesaurus
thésaurus chrétien multilingue
mehrsprachiger christlicher Thesaurus
tesauro cristiano multilingue

Vi estas petata sendi al la revuo adresojn de teologiaj bibliotekoj, por enketo al la bibliotekistoj pri indeksado kaj eventuala partopreno en TETH, unue por la lingvoj angla, franca, germana, hispana kaj Esperanto.

GENESE 11:1-9 permet de comparer la CITE HUMAINE et le ROYAUME DE DIEU.

GENESI 11:1-9 permette di parago-la CITTA' UMANA e il REGNO DI DIO.

GÉNESIS 11:1-9 permite comparar la CIUDAD HUMANA y el REINO DE DIOS.

GENESIS 11:1-9 allows us to compare the HUMAN KINGDOM with the KINGDOM OF GOD.

GENESIS 11:1-9 erlaubt den Vergleich von MENSCHLICHEm STAATSWESEN und REICH GOTTES.

Comment attendre le RETOUR DE JESUS CHRIST et vivre la PRESENCE DE JESUS CHRIST ?

Come aspettare il RITORNO DI GESU' CRISTO e vivere la PRESENZA DI GESU' CRISTO ?

¿Cómo aguardar la SEGUNDA VENIDA DE JESUCRISTO y ver la PRESENCIA DE JESUCRISTO ?

How to wait for the SECOND COMING OF JESUS CHRIST, and live in the PRESENCE OF JESUS CHRIST ?

Wie kann man die WIEDERKUNFT JESU CHRISTI erwarten und zugleich in der GEGENWART JESU CHRISTI leben ?



BAKLARZ (Karol). - *Konsolo por la homaro.*
*Evangeliaj Kajeroj*, 1989, 5, pp. 27-31.
En la LASTAJ TAGOJ, kio pri la PACO, pri la TERO ?

KOOPMANS-SCHOTANUS (Jelly). - *Realiĝo de la Regno.*
*Evangeliaj Kajeroj*, 1989, 5, pp. 33-37.
Kiel videbligi la REGNOn DE DIO ?

Dans les DERNIERS JOURS, qu'en sera-t-il de la PAIX, de la TERRE ?

Che ne sarà della PACE e della TERRA negli ULTIMI GIORNI ?

En los DÍAS POSTREROS, ¿ qué decir sobre la PAZ, sobre la TIERRA ?

During the LAST DAYS, what about PEACE and what about the EARTH ?

Wie steht es in den LETZTEn TAGEn um den FRIEDEN, um die ERDE ?

Comment visibiliser le ROYAUME DE DIEU ?

Come rendere visibile il REGNO DI DIO ?

¿ Cómo hacer visible el REINO DE DIOS ?

How to make the KINGDOM OF GOD visible ?

Wie läßt sich das REICH GOTTES sichtbar machen ?



MARTIN (Alain Georges). - *Sabato kaj Regno de Dio.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 1989, 5, pp. 39-41.

SABATO. signo de la REGNO DE DIO.

TWILLEY (John Frederic). - *La veno de la domomastro.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 1989, 5, pp. 43-45.

El MARKO 13:35, la aŭtoro parolas pri la REVENO DE JESUO KRISTO.

Se vi posedas tiun ĉi revuon, aŭ antaŭan numeron, ne pere de abono, bonvolu indiki tiun ĉi posedon al la administracio, tiel vi povos esti pli bone informita.

Le SABBAT, signe du ROYAUME DE DIEU.

The SABBATH, a sign of the KINGDOM OF GOD.

Il SABATO, segno del REGNO DI DIO.

Der SABBAT, ein Zeichen für das REICH GOTTES.

El SÁBADO, signo del REINO DE DIOS.

Partant de MARC 13:35 l'auteur parle du RETOUR DE JESUS CHRIST.

From MARK 13:35, the author speaks about the SECOND COMING OF JESUS CHRIST.

Da MARCO 13:35, l'autore parla del RITTORNO DI GESU' CRISTO.

Ausgehend von MARKUS 13:35 spricht der Verfasser über die WIEDERKUNFT JESU CHRISTI.

En MARCOS 13:35, el autor habla sobre la SEGUNDA VENIDA DE JESUCRISTO.



FEATHERSTONE (David). - *La reveno de Jesuo, ĉu atendi ?*

*Evangeliaj Kajeroj*, 1989, 5, pp. 47-49.

Kio estos la REVENO DE JESUO KRISTO ?

COUSSON (Philippe). - *Nenio nova sub la suno.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 1989, 5, pp. 57-60.

La NOVA EPOKO kaj kiel reagi.

Sur via adres-etikedo troviĝas du numeroj. La unua estas la numero de via adreso en mia sliparo, kaj la dua, interkrampa, estas la numero de la lasta Evangeliaj Kajeroj, kiun vi ricevos, se vi ne plu abonos aŭ ne plu verkos.

Que sera le RETOUR DE JESUS CHRIST ?

In che cosa consisterà il RITTORNO DI GESU' CRISTO ?

¿ Qué cosa será la SEGUNDA VENIDA DE JESUCRISTO ?

What will the SECOND COMING OF JESUS CHRIST be like ?

Worum wird es sich bei der WIEDERKUNFT JESU CHRISTI handeln ?

Le NOUVEL AGE et comment réagir.

La NUOVA ERA, e come reagire ad essa.

La NUEVA ÉPOCA y cómo reaccionar.

The NEW AGE and how to react.

Das NEUE ZEITALTER (NEW AGE) wie reagieren wir darauf.



ABONOJ

Abono por du numeroj, t.e. unu jaro : 70 FRF (ECU 10)
(Vi nepre indiku por kiu jaro aŭ ekde kiu numero).

al *Philippe Cousson, Rue de Pré Ventenet, 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio.*
per poŝta konto, Philippe Cousson, 244 45 X, Limoges, Francio,
aŭ per internacia poŝta mandato en FRF,
aŭ per 16 internaciaj respondkuponoj.

aŭ al Aŭstrujo, *Heinz Platzer, Brünnerstr. 107-109/2/1, 1210 Wien*
ÖPSK-konto 3675.724, Heinz Platzer
Belgio, *Jacques Lemaire, r. des déportés 100, 6180 Courcelles*
konto 001-0405933-64
Britio, *Thomas Neil, 82 Glasgow Rd, Kilmarnock, KA3 1UN*
national giro, FEBC, 65274 0006
F.R. Germanio, *Sr Theotima Rotthaus, 7794 Wald*
Sparkasse Meßkirch K-tonummer 9434, BLZ 693 520 60
Irlando, *Maire Mullarney, Mill H., Whitechurch Rd, Rathfarnham, Dublin 14*
Israelo, *Esperanto Centro, P.O. Box 23 180, 91231 Jerusalem*
Italio, *Centra Oficejo de IKUE, v. F. Berni 9, 00185 Roma*
CCP, Centra Oficejo de IKUE, 23290000
Nederlando, *Leen Hordijk, v. Hogendorplaan 4, 3135 CD Vlaardingen*
post giro, KELI, 5506132
Svedio, *Gustav Stenholm, Domprostgatan 18 B, 532 31 Skara*
poŝtĝirkonto, Kristliga Esperantoförbundet, 9 14 39-0
Svislando, *Lina Reutemann, Iddastr. 34, 9008 St Gallen*
poŝta ĉekkonto, KELI svisa sekcio (Z en), 80-52203-8, Zürich
Usono, *Edwin C. Harler Jr, 47 Hardy Rd, Levittown, Pa 19056*

aŭ al UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, pere de la konto phco-m.
(vidu en la jarlibro 1989, ĉe la paĝo 34)

Ni daŭre serĉas perantojn en aliaj landoj.

Vi kompreneble povas donace aboni iun alian, kiu cetere havus problemon por sin aboni.

## ARTIKOLOJ


Gerrit BERVELING : Regno de Dio, revo de Dio 3

Philippe COUSSON : Kiu Regno de Dio ? 7

Jacques TUINDER : Homoj konstruas al si malregnon 13

Hugh MARTIN : La reveno de Jesuo, motivo por la Eklezio 21

Karol BAKLARZ : Konsolo por la homaro 27

Jelly KOOPMANS : Realiĝo de la Regno 33


## KONTRIBUAĴOJ


Alain-Georges MARTIN : Sabato kaj la Regno de Dio 39

J.-F. TWILLEY : La veno de la domomastro 43

David FEATHERSTONE : La reveno de Jesuo : Kion atendi ? 47

Edwin HARLER Jr : Venu via Regno 51

BALOG Deszö : La senco kaj celo de l'vivo 53


## NOTICOJ


Philippe COUSSON : Nenio nova sub la suno 57

Pierre BERTHOUD : La Franca Revolucio : protestanta rigardo 61

Mesaĝo al la kristanaj eklezioj de Eŭropo 65


prezo : 35 FRF (ECU 5)